

# LINGVO INTERNACIA

eliranta inter la 15. kaj la 20. de ĉiu monato.

Redakcio kaj administracio : PARIS, 33, rue Lacépède.

## ENHAVO

TH. CART : La lecionoj de nia Barcelona Kongreso. —  
D-ro P. CORRET : La Kvina Universala Kongreso de Esperanto. — *Aldono* : Kongresa Dokumentaro.

## LA LECIONOJ DE NIA BARCELONA KONGRESO

« Nia lingvo estas nun vivanta lingvo kaj ĝi povas evolui nur kiel la aliaj vivantaj lingvoj ! »

Per tiuj vortoj D-ro Zamenhof fermis la Barcelonan Kongreson.

Kaj vere li esprimis ne nur sian senton sed la ĝeneralan opinion de la Akademianoj, de la Lingva Komitato kaj de ĉiuj Kongresanoj.

Jes, nia lingvo estas *nun* unu el la vivantaj lingvoj de l' mondo, inter kiuj ĝi havas nun *sian* propran lokon !

Kvankam ne nova la konstato de nia Majstro, estas la ĉefa leciono de l' Kongreso kaj, por tiel diri, la resumo de ĝiaj laborkunvenoj.

Ĉu en la Akademio, ĉu en la Lingva Komitato, oni plene aprobis la metodon, kiu traktas Esperanton ne kiel projekton, sed kiel realan, vere ekzistantan lingvon. S-ro de Saussure, direktoro por la teknika vortaro, tre energie deklaris, ke tiu sola aposteriora metodo taŭgas, ke sola ĝi estas ne nur praktika, sed eĉ ebla. Same opinias S-ro Grabowski por la gramatika parto.

La gravan raporton de Rektoro Boirac pri la laboroj de l' Akademio ĉiuj povos legi kaj meditos. Ĝi kondukas al sama konkludo : *Esperanton oni devas konsideri kiel vivantan lingvon*. Tiu raporto enhavas tre interesajn kaj necesajn konsilojn pri la danĝero enkonduki per nenatura vojo novajn sufiksojn, novajn radikojn, kiam sufiĉas jam nia sufiksaro, nia radikaro. Tute prave la Akademio montris sin precipe severa kontraŭ la enkonduko de novaj sufiksoj aŭ prepozicioj en la komunan lingvon. Laŭ la trafa esprimo de S-ro Boirac, ili povas atendi « ĉe la pordo ». La konsilojn de nia eminenta prezidanto ni ĉiuj penu sekvi !

Lecionon alian, ne lingvan, donis al ni la Kongreso.

Ĝi montris tre klare, ke se, iam, la Esperantistaro bezonos reprezentantaron tutmondan, tio estos efektivebla, nur post longa pripensado, post atenta ekzameno. Projekton pri ĝenerala reprezentantaro ni ĉiuj volonte ekzamenos sen autaŭjuĝoj, sed ni volas ĝin ekzameni tute trankvile, tute detale ; kaj tio estas certa, ke la esperantista popolo ĝin povos akcepti nur kun plena garantio de « neregado ». Registaron ni ne bezonas ; reprezentantaron eble, sed ne certe ! Ni studu senpartie la demandon !

Tria leciono : Ni atente zorgu en niaj Kongresoj, por ke la vivo estu kiel eble plej komuna, dank' al komuna konstruaĵo — aŭ tre proksimaj konstruaĵoj — por la diversaj kunvenoj, ekspozicio, babilejo, k. t. p., dank' al komunaj ĝeneralaj ekskursoj, kiel en Genevo kaj Dresdeno, dank' al komuna manĝohalo kiel en Cambridge, dank' al

festoj, en kiuj *ĉiuj* partoprenas ! Se ne, iom post iom malaperos tiu sento de frata egaleco inter ni ĉiuj, kiu estas unu el la plej grandaj ĉarmoj en niaj Kongresoj ; iom post iom en nia esperanta respubliko ŝajnos naskiĝi ia « aristokrataro », kiun certe neniu inter ni amas nek deziras.

Kial tiu komuna vivado estis tre malfacila en Barcelono, ni tre bone scias kaj ni petas, ke oni ne vidu en nia rimarko ian kaŝitan riproĉon. Ni ĉiuj estas tre dankaj al niaj amikoj Barcelonaj kaj Hispanaj kiel al ĉiuj organizintoj de l' Kvina Kongreso, pro iliaj senlacaĵoj klopodoj en cirkonstancoj tre specialaj kaj ni ne forgesos, ke dank' al ilia energio kaj fido la Kvina Kongreso estis por nia afero nova kaj neduba sukceso !

Chexbres, la 16. de Sept. 1909.

TH. CART

Cefredaktoro de « Lingvo Internacia ».

## LA KVINA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**Barcelono, 5—11. Septembro 1909.**

Apenaŭ unu monaton antaŭ la fiksita dato de la Barcelona Kongreso ĉiuj ankoraŭ sin demandis maltrankvile, pro la politikaj okazoj en la kongresurbo, ĉu la Kongreso tie povos okazi. Eĉ sin prezentis la demando, ĉu, pro manko de prepara tempo, ĝi povos esti rapide improvizita en iu alia urbo hispana aŭ franca. Tial, kiam oni sciiĝis, ke la Kongreso tamen okazos en Barcelono, plej optimistaj profetoj nur kuraĝis antaŭvidi, ke maksimume la nombro de la kongresanoj eble povos atingi 500. Kaj en la kampo de la malamikoj de Esperanto granda estis la ĝojo ; jam dum la Kongreso mem, kredante siajn dezirojn plenumitaj, ili laŭte distrumpetis pri Kongreso sen kongresanoj kaj pri « bankroto

de Esperanto ». Tute kontraŭa estis la vero, kaj la Kongreso estis pli ĝuste signo de « malbankroto » de Esperanto. Kvankam, kompreneble, la nombro de la kongresanoj ne atingis tiel altan nombron, kiel en Dresdono, ĝi tamen superis, malgraŭ la konataj malfavoraj cirkonstancoj, ĉiujn eĉ plej optimistajn antaŭkalkulojn. En Dresdono estis proksimume 1400 kongresanoj; en Barcelono estis enskribitaj 1327 kart-mendintoj, el kiuj 1210 efektive venis al la Kongreso. Tiujn nombrojn ni sciiĝis en la akceptejo dum la kongresa semajno, sed ili sendube ne estas tute ĝustaj; ĉiutage dum la Kongreso mem enskribiĝadis ja novaj kongresanoj, kaj ankaŭ kongresaj komitatanoj ĉiutage ricevadis novajn aliĝojn. La cititaj nombroj estas do nur *minimumaj*. Ili estas efektive iom malpli altaj, ol en la pasinta jaro; kaj la nombro de la kongresanoj, kiu ĉiujare pligrandiĝadis, tiun ĉi jaron iomete malgrandiĝis. Sed, se oni konsideras, kia estis la loka situacio en la momento de la Kongreso kaj kiajn terurajn rakontojn raportis la gazetoj pri la stato de Barcelono, oni facile komprenas, kia estis la efektiva kaŭzo de la negrava malgrandiĝo. Ĝi tute ne estis *esperanta*, sed nur *ekstera*, kaj la kompare tamen granda nombro da kongresanoj pravas, ke ankoraŭ dum la pasinta jaro nia afero ŝatinde progresis. Oni notu ankaŭ, ke la unuan fojon en Barcelono nia Kongreso estis duonoficiala: la hispana registaro invitis la ceterajn registarojn, ke ili sin reprezentigu oficiale en la Kongreso; la plimulto delegis sian konsulon en Barcelono aŭ sian diplomatian reprezentanton en Madrido; la registaroj de Usono, Belgujo kaj Norvegujo sin reprezentigis per specialaj senditoj.

Por niaj unuaj Kongresoj oni tre prave insistis, ke ili okazu en negrandaj urboj. Jam en la pasinta jaro la Kongreso tamen okazis en granda germana urbego kun la konata sukceso, kaj ĝia propaganda efiko estis grandega. Ankaŭ tiun ĉi jaron bonega estis la propagando en Barcelono. Certe, neniu Barcelonano povis nescii pri la Kongreso. Ĉie pendis esperantaj flagoj: de multaj fenestroj en la urbo kaj de ĉiuj jurnal-kioskoj sur la « Rambloj », ĉefa promenejo de Barcelono. Ĉie oni vendis esperantajn jurnalajn, librojn, poŝtkartojn. En multaj lokaj jurnalaj estis artikoloj pri la Kongreso. La ilustritaj gazetoj ĉie estis elmetitaj, ĉe la jurnal-kioskoj sur la Rambloj, en ekspoziciaj fenestroj de

librejoj, kaj multaj pasantoj scivole haltis por ilin rigardi. Sur la ĉefaj stratoj gazetvendistoj laŭte anoncadis *La Publicidad*, kiu ĉiutage donadis raporton pri la Kongreso. Tramveturiloj surportis afiŝojn kun la vortoj « Al la Akceptejo » kaj eĉ esperantajn reklamojn : « La skribmaŝino *Oliver* estas la plej bona el ĉiuj skribmaŝinoj ». Blindaj almozuloj sur la stratoj ludis nian himnon kaj pro tio ricevadis multajn almozojn de esperantistoj. Dank' al malavara donaco de S-ro Ĉefeĉ, ĉiuj kongresanoj ricevis ses katalunlingvajn « Ŝlosilojn » kaj du samlingvajn « Tutojn », bonegan materialon por propagando. Tiujn ŝlosilojn ili disdonis al la multaj personoj, kiuj pro la Kongreso ekinteresiĝis pri Esperanto.

La grandeco de la urbo do tute ne malhelpis la propagandan efikon de la Kongreso. Ion alian ĝi bedaŭrinde tre malhelpis, nome la « kongresan senton », kiun bone konas ĉiuj partoprenintoj de niaj unuaj Kongresoj. Dise loĝis ĉiuj kongresanoj en multaj diversaj hoteloj, dise ili vagadis tra la urbo, vizitante private la ĉefajn vidindaĵojn.... Bedaŭrinde mankis ia centra kunvenejo, kie la kongresanoj povus ofte sin renkontadi por amika interparolado. Niaj kongresaj organizantoj ja ne forgesu, ke la *ĉefa* ĉarmo de niaj ĉiujaraj kunvenoj ne troviĝas en grandiozaj festoj kaj ceremonioj, nek en gravaj kunsidoj kaj diskutoj. Ĝi troviĝas en ofta *kunestado* de samideanoj, kiuj ĝoje revidas post unu jaro kongresajn amikojn kaj kun ili povas libere interparoladi. Nenio ĝis nun superis en tiu rilato la Akceptejon de la Cambridge'a Kongreso, kien — eble ankaŭ pro ofta pluvado — ĉiuj ofte iradis sen speciala celo, nur por tie eble renkonti iun amikon kaj kore kun li interparoladi. Unu el la plej agrablaj memoroj de la « konstantaj kongresanoj » ankaŭ estas la *komuna* ŝipveturado al Vevey dum la Geneva Kongreso. Tia centra kunvenejo, tiaj komunaj ekskursoj efektive mankis en Barcelono, kaj la kongresanoj iom restis kiel izolitaj fremduloj. La akceptejo troviĝis en la Palaco de Belartoj, dum preskaŭ ĉiuj kunsidoj okazis en la Universitato, en alia kvartalo de la urbo. Cetere ĝi ne estis oportune aranĝita, kiel en Cambridge, por komuna restado kaj babilado ; ĝi estis proksimume nur disdonejo de paperaĵoj ; tre ofte ĝi estis simple... fermita, kaj ĉar por tien iri oni devis efektiviĝi ĉiufoje kvazaŭ vojaĝeton, oni plej ofte preferis ĝin ne viziti. Alia kaŭzo, kial mankis en

Barcelono la kongresa sento, estis ia dupartigo de la « granda rondo familia » : unuflanke kvazaŭa aristokrataro, — aliflanke la *vulgum pecus*. Ĉie estis rezervitaj lokoj por la unua ; al la dua estis dediĉitaj nur ĉiaspecaj... afablaĵoj de la kongresa sekretariino.

Grava demando pritraktita dum la Kongreso estis starigo de ia « reprezentantaro » de la propagandaj societoj, — demando tiel grava, kiel neatendita. Oni memoras, ke dum la Boulogne'a Kongreso oni pridiskutis iel saman demandon pri interligo de niaj propagandaj societoj. Sed ĉar oni povis dum kelkaj monatoj antaŭ la Kongreso studadi kaj esplori la demandon, la propono estis malakceptita de granda plimulto en la Kongreso. Tamen tiu propono ne mortis, kaj en iom ŝanĝita formo ĝi reaperis en Barcelono. Sed tiun ĉi fojon oni zorge evitis *ĉian antaŭan esploron*. Kaŝita, sekreta, mistera restis la propono ĝis la lasta momento. Ankoraŭ dum la unuaj tagoj de la Kongreso, raporto pri ĝi estis severe konfidencia kaj komunikita nur al kelkaj privilegiuloj. « Mi ne volas, ke oni faru al mi novan Boulogne'on », diris unu el la ĉefaj proponantoj.... Kaj subite eksplodis la bombo ! Subite oni proponis la « reprezentantaron » al la kongresanoj, por ke en la daŭro de unu kunsido, sen sufiĉa esplorado, ili tuj faru pri ĝi decidon, espereble favoran. Sed okazis tute alie : kvankam oni penadis, antaŭ la kunsido, private antaŭkonverti la ĉefajn el la supozitaj kontraŭstarontoj, multaj kongresanoj malaprobis la projekton (kiun cetere aliaj aprobis kaj defendis), aŭ almenaŭ petis, ke oni prokrastu la demandon ĝis la venonta jaro, por ke oni povu ĝis tiam ĝin detale studi. Tia peto estis des pli prava, ĉar la propono pri « reprezentantaro » tute similis proponon lastatempe prezentitan de la Idistoj, por akceptigi de ni iliajn reformojn. Sed oni tamen ne povis prokrasti la *tutan* demandon. Laŭ la diro de la proponantoj, la *ĉefa* celo de ilia propono estis certigi monajn rimedojn, por finance subteni la oficialajn instituciojn de Esperanto, kiuj ĝis nun vivis nur dank' al malavaraj privataj monoferoj. Diversaj oratoroj tre elokvente montris, ke la Esperantistaro, tre danka por tiuj monoferoj, devas mem subteni siajn oficialajn instituciojn. Pri tio estis en la Kongreso nenia kontraŭstaro. S-ro Privat do proponis, ke oni starigu ian konsilantaron, por zorgi *nur kaj ekskluzive* pri financa subteno de la oficialaj institucioj de Esperanto.

S-ro Cart petis, ke oni diskutu pri teksto *presita* kaj disdonita al ĉiuj kongresanoj. Forlasante la unue prezentitan proponon pri « reprezentantaro », oni presigis la proponon de S-ro Privat.... Kaj en posta kunsido tiu ĉi propono estis tuj *sen ia rimarko kaj unuanime akceptita*.

Tiel montriĝis tre klare, ke, se la Esperantistoj prave timas doni al si *registaron*, kiu povus esti *tre danĝera* por nia afero, ili senŝanceliĝe kaj plej kore akceptas preni sur sin *la financon subtenon* de siaj oficialaj institucioj.

Oni nur ne ŝanĝu *poste* ilian decidon!

La granda diskutado pri « reprezentantaro » per si mem ankaŭ montris, ke la esperantistaj kongresanoj efektive farigas pli kaj pli elokventaj oratoroj kaj kun mirinda flueco parolas nian lingvon. Certe, iu fremdulo, okaze troviĝanta en la kongresa ĉambro, ne povus eĉ unu momenton suspekti, ke « tiuj homoj parolas artefaritan lingvon ». Ankaŭ dum alia kunsido pli forte ankoraŭ estis montrita tiu elokventeco, t. e. kiam S-ro Privat faris paroladon pri « Esperanto, vivanta lingvo de vivanta popolo ». Ĉiuj esperantistoj jam de longe konas la elokventecon de nia juna svisa amiko. Tiun ĉi fojon li ankoraŭ superis sin mem kaj montris nedisputeblian talenton de vera oratoro; lia parolado certe estis la plej grava rimarkindaĵo de la tuta Kongreso.

---

La plimulto de la kongresanoj alvenis sabaton 4. Septembro, vespere. Tiel granda kaj ne antaŭvidita estis ilia nombro, ke multaj el ili devis iom malkontente pasigi la nokton en Port-Bou, ĉe la landlimo, ĉar estis nur unu luksa vagonaro, por ilin transveturigi al Barcelono, kaj ĝi baldaŭ estis superplenega.

La feliĉuloj, kiuj tamen povis tiun vesperon atingi Barcelonon, ĉu tuj serĉis hotelon, se ili ne estis antaŭe mendintaj loĝan biletaron, ĉu iris al la Akceptejo, por tie ricevi en granda koverto amason da diversaj paperaĵoj kaj objektoj.

Inter tiuj paperaĵoj aparte notinda estis, krom la kongresa programo kaj la jam aluditaj ŝlosiloj de Ĉefeĉ, belega kongreslibro. Ĝis nun ne venkitajn rekordojn starigis la antaŭaj Kongresoj; la Tria: la reĝan akcepton de D-ro Zamenhof, la komunan manĝejon en la Grenvendejo, la

bonege organizitan Akceptejon ; la Kvara : la mirindan kaj ne supereblan prezenton de *Ifigenio en Taŭrido*, en la Dresdena reĝa operejo. Siavice la Kvina ankaŭ starigis rekordon, nome la kongreslibron. Belege, riĉege eldonita estas tiu libro, plena de interesaj sciigoj. Nur du malgravajn kritikojn oni permesos : 1-e, eble iom tro multaj estas la preseraroj en tiel bela eldonaĵo ; 2-e, pli bone estus ricevitian libron *antaŭ* la Kongreso, ol en ĝia komenco. Ĝi ja enhavas multajn tre interesajn kaj utilajn sciigojn pri la kongresurbo, kiujn kun granda profito oni legus antaŭ la alveturo, dum bone konate estas, ke en la tuta daŭro de niaj kongresoj oni ne havas liberan tempon por ia ajn legado,... apenaŭ eĉ por sendi ilustritajn poŝtkartojn al malfeliĉaj samideanoj ne-kongresanoj.

El la granda koverto ankaŭ estis notindaj esperanta ventumilo kaj kongresa insigno. La unua estis donacita de *Presa Esperantista Societo*. Tiun kvazaŭ nacian ilon de Hispanujo dum varmaj tagoj aparte ŝatis ĉiuj kongresanoj ; ĝi eĉ estis tre oportuna « gestilo » por Rektoro Boirac, kiu, dum unu el siaj elokventaj paroladoj, energie kaj konvinke ĝin ŝvingis super la admire aŭskultanta kongresanaro. La kongresa insigno definitive firmigis la raportanton en la konvinko, ke pri artaj aferoj li estas tute malkompetenta. Jam la bluan ĉevalon de la kongresa afiŝo li ne pasie ŝatis. Ankaŭ la kongresan insignon li ne trovis belega, kvankam sendube ĝi estis artoplena. Li eĉ opiniis (sed tion ne diskonigu !), ke la kongresaj insignoj pli kaj pli fariĝas malbelaj, samtempe kiel pli grandaj. Tiu ĉi, per sia koloro kaj grandeco, sur nigraj vestoj tute similis la brustoplaton de francaj enterigistoj, sed ankaŭ ĝi per tiu sama koloro kaj grandeco estis de malproksime rimarkebla. Ĝi neeviteble sin trudis al la okuloj de ĉiuj preterpasantoj. La Barcelonanoj nepre devis rimarki, ke en ilian urbon alvenis tre multaj tiel nomitaj esperantistoj. Tre granda do estis la *propaganda* valoro de la kongresa insigno, kaj oni eble ne malprave opinios, ke por propaganda kongreso tio ĉi estas la ĉefa kaj plej dezirinda kvalito.

Ricevinte sian grandan koverton en la Akceptejo, ĉu sabaton vespere, ĉu la postan matenon, la kongresanoj povis viziti la apude aranĝitan ekspozicion. Tie ili trovis, kiel ĉiujare, multajn tre interesajn esperantaĵojn, kiujn ni ne pri-



skribos denove. Tie ankaŭ plikonfirmiĝis la malkompetenteco de la raportanto pri artaj aferoj, kiam li vidis sed ne tre varme admiris iun novan oleopentritan portreton de D-ro Zamenhof. Bustan statuon de la Majstro li kontraŭe trovis tre bela, tre simila al ĝia modelo kaj vere «kvazaŭ vivanta». Ne en la ekspozicio ĝi estis, sed unuan tagon de la Kongreso staris sur la komitata estrado. Poste ĝi ial bedaŭrinde malaperis.... Bonvolu ĝia aŭtoro, konata Lyon'a artisto, pardonu por tiu sincera laŭdo de malkompetentulo !

\*

\* \* \*

Dimanĉon matene okazis diservoj: katolika en la preĝejo de la *Casa de Caridad*, kun esperanta prediko de pastro Richardson; protestanta en evangelia kapelo, kun prediko de pastro Rust. Dum la katolika meso pastro Richardson, portante sur sia surpliso la kongresan insignon, predikis pri la evangeliaj vortoj «Novan ordonon mi donas al vi: amu vin unuj la aliajn», kaj donis al la ĉeestantoj la papan Apostolan Benon. Post la meso, la infanoj, knaboj kaj knabinoj, de la *Casa de Caridad*, faris en la korto de la domo gimnastikajn ekzercojn kaj kantis diversajn kantojn. La lasta estis «La Espero». Iom ŝanceliĝetis en la komenco la junaj kantantoj, sed fine tamen tre bone sukcesis dank' al bonkora helpo de S-ino de Ménil, kiu kune kun ili ekkantis la unuajn vortojn.

Je la 11-a estis oficiala akcepto de D-ro Zamenhof en la Palaco de la Belartoj. Post privata akcepto, pri kiu tute nesciis multaj kongresanoj, D-ro Zamenhof kun la eminentularo eniras en la vastan belege ornamitan halon. Tiam eksplodas aplaŭdoj, laŭtiĝas krioj «Vivu Zamenhof!», en kora entuziasma ovacio. Ekludas muziko «La Esperon», kaj kune ĝin kantas la tuta staranta ĉeestantaro, dum la Doktoro kaj liaj akompanantoj supreniras la estradon. Kiam silento proksimume refariĝis, la Urbestro de Barcelono komencas paroladon en kataluna lingvo. Longa estas lia parolado, kaj el la laŭteco de lia voĉo kun varma gestado oni povas konkludi, ke ĝi estas tre entuziasma. Post li, parolas ankaŭ katalune alia Barcelona eminentulo, kun egala entuziasmo. Sed bedaŭrinde, oni nenion komprenas kaj tial pli kaj pli laŭtiĝas privataj konversacioj, dum el la planko kvazaŭ elkreskas altaj ŝtupetaroj kun fotografiloj, direktitaj al la eminentularo,

staranta sur la estrado. Poste parolas siavice D-ro Zamenhof. En Esperanto li parolas, sed lia voĉo ne estas tiel forta, kiel tiuj de la Barcelonaj eminentuloj, kaj la konversacia bruado ne ĉesas. Nur disajn vortojn oni aŭdas en la vastega halo: « Barcelono... estonteco... ». Ĉio cetera perdiĝas. S-ro Pujula tradukas en katalunan lingvon la saluton de D-ro Zamenhof, kaj iom post tagmezo finiĝas la ceremonio.

Posttagmeze okazis piedpilka festo. Ĝin ĉeestis D-ro Zamenhof kun multaj kongresanoj. Aliaj ĉeestis kurludon de taŭroj en la *Arenoj de Barcelono*, sporton certe pli barbaran, sed ankaŭ pli « hispanan », ol piedpilko. Fine okazis, je la 10-a vespere, en la teatro *Romea*, tre bela koncerto, kiun ĉeestis D-ro Zamenhof kun sia edzino.

\*  
\*   \*   \*

Lundon matene, post kunvenoj de la diversnacionoj, por elekti delegitojn, okazis la oficiala malfermo de la kongreso.

D-ro Mybs, kiel prezidinto de la Kvara Kongreso en Dresdeno, malfermas la kunsidon. En la nomo de la komitato li proponas, ke estu prezidanto de la Kongreso S-ro Pujula, vic-prezidantoj S-roj Perogordo kaj Sabadell, sekretarioj S-ro Chavet kaj S-rino Germaine Rebours Pujula. Poste li transdonas sian povon en la manojn de S-ro Pujula. Li deziras, ke la Kvina Kongreso havu saman sukceson kiel la antaŭaj kaj alproksimigu nin al nia celo, al la celo de la tuta homaro.

S-ro Pujula dankas, ĉar li havas la honoron esti elektita kiel prezidanto de la Kvina Kongreso. Ne al li persone venas tiu ĉi honoro, sed al ĉiuj Barcelonaj esperantistoj, al la Barcelonaj societoj, kiuj havas preskaŭ 3000 membrojn, krom izolitaj esperantistoj. Je ilia nomo li deziras al la kongresanoj plej bonan restadon en Barcelono. Tiu ĉi Kongreso ankaŭ estu plej fruktoporta por nia afero kaj starigu ĉiam pli alte la standardon de nia celo.

La parolo estas al nia kara Majstro, D-ro Zamenhof.

D-ro Zamenhof starigas. Longa aplaŭdado lin salutas. Tiun ĉi jaron li ne legas, kiel ĝis nun, antaŭpreparitan paroladon, sed nur diras kelkajn salutajn vortojn: Ĉiun fojon, kiam disiĝas post kongreso la esperantistoj, ili kun antaŭa ĝojo diras unuj al la aliaj « Ĝis la revido! » kaj

sopire ili dum la tuta jaro atendas la momenton, kiam ili povos denove premi al si reciproke la manon. Li kontraŭe ĉiam sin preparas por la kongreso kun peza koro, pro la honoroj, kiujn li devas akceptadi. Tiujn honorojn al li dediĉas la esperantistoj, ĉar bezonante ion konkretan, ili vidas en li la reprezentanton de sia komuna ideo. Li dezirus stari ne *antaŭ* ili, sed *inter* ili, sed la afero ne dependas de li, kaj ankoraŭ hodiaŭ li staras antaŭ ili, kiel la simbolo de ilia unueco, ĝis la momento, kiam ili eble havos alian reprezentanton. Li esprimas la plej respektan dankon al Lia Moŝto la reĝo Alfonso XIII, kiu bonvolis akcepti la honoran prezidant-econ de la Kongreso. Li esprimas ankaŭ dankon al la ministroj, kiuj akceptis esti ĝiaj altaj protektantoj; al la registaro, kiu invitis la aliajn registarojn oficiale sendi delegitojn; al la urbo Barcelono, kvankam eksteraj cirkonstancoj ĝin malhelpis montri sian entuziasmon; al la Komitato, kiu laboris por prepari la kongreson. En la ĝisnunaj Kongresoj li ĉiam havis ion gravan por diri kaj parolis longe. Hodiaŭ estas nenio grava, kaj li nur parolos mallonge. Dum la pasinta jaro ni prospere vivis, kreskis kaj fortigis en ĉiuj rilatoj. Al laborintoj koran dankon! Ni nun devas labori kaj konsiliĝi kune. El la laboroj ni prenu forton por la laboro de la tuta venonta jaro! (*Longa aplaŭdo*).

S-ro Pujula, repondante al la deziro de la Majstro, proponas, ke la Kongreso sendu dankan telegramon al la reĝo kaj al la ministroj. La tekston oni redaktos poste kaj submetos posttagmeze al la Kongreso. (*Aprobo*).

S-ro Chavet donas la nomojn de la naciaj vic-prezidantoj kaj delegitoj. **NACIAJ VIC-PREZIDANTOJ**; *Belgujo*: S-ro Van der Biest; *Britujo*: S-ro Wackrill; *Francujo*: S-ro Cart; *Svisujo*: S-ro de Saussure; *Usono*: S-ro Herbert Harris; *Germanujo*: D-ro Kandt. — **DELEGITOJ DE LA REGISTRAROJ**: *Belgujo*: S-roj Van der Biest kaj Van Schoor; *Usono*: S-ro Reed; *Norvegujo*: S-ro Schiebe. (Ankaŭ diversaj urboj hispanaj kaj alilandaj estis oficiale reprezentataj). — **NACIAJ DELEGITOJ** *Aŭstrujo*: S-ro Kubiček (bohema lingvo); *Belgujo*: Pastro Richardson; *Britujo*: S-roj Mudie kaj Ellis (angla lingvo), S-ro Wilson (skotoj), S-ro Edward (Gibraltaro), Pastro Parker (irlandanoj), S-ro Mudie (Malto); *Brazilujo*: S-ro João Keating; *Finlando*: S-ro van Frenckell; *Francujo*: S-roj Decourt kaj Drudin; *Hispanujo*: S-ro Perogordo

(kastila lingvo), S-ro Allende (vaska lingvo), S-ro Braga (astura lingvo), S-ro Aguilar (valencia lingvo), S-ro Bremon y Masgrau (kataluna lingvo); *Holando*: S-roj Vermaas kaj Odufre; *Germanujo*: S-roj Arnhold kaj Petzold; *Hungarujo*: S-ro Marich; *Italujo*: S-ro Tellini; *Respubliko Argentina*: S-ro Albiñana; *Polujo*: S-roj Grabowski kaj Rudnicki; *Rusujo*: S-ro Ostrovski kaj S-ro Smirnov; *Samos*: S-ro Stamatiades; *Turkujo*: S-ro Jacques Guéron; *Svisujo*: S-ro Privat; *Usono*: S-roj Reed kaj Baker.

Poste la delegitoj laŭvice salutas la Kongreson.

S-ro Van der Biest diras, ke li oficiale reprezentas la registaron de Belgujo. Tio estas evidenta pruvo, ke Esperanto en Belgujo estas en plena vivforto, malgraŭ la tiea lastatempa krizo. Li konstatas la agemecon de la belgaj grupoj, la prosperadon de la Belga Ligo Esperantista, de la *Belga Esperantisto* kaj de la tuta esperanta movado en Belgujo. Li ankaŭ memorigas pri la sukceso de la unua belga Kongreso. Ministro komisiis lin redakti detalan raporton pri la Kongreso. Li esperas, ke ĝiaj konkludoj konvinkos la registaron. Li esprimas dankon al la reĝo de Hispanujo, al la hispana registaro, al la urbo Barcelono, al la tuta Kongreso kaj al D-ro Zamenhof. Vivu li kaj vivu Esperanto!

Lia Moŝto la Urbestro de Barcelono, S-ro Layret, parolas katalune. S-ro Bremon y Masgrau tradukas. Li bedaŭras, ke li ne povas paroli esperante. Li salutas ĉiujn kongresanojn en la nomo de la Urbo kaj esperas, ke la kunsidoj estos fruktoplennaj por la esperanta movado. La interrilatoj inter diversnacionoj fariĝis multe pli oftaj, kaj ni devas memori, ke krom nacionoj, ni estas ankaŭ homoj. Por tio multe helpas la internacia lingvo Esperanto, kies genian aŭtoron li salutas plej kore.

S-ro Reed, en la nomo de la Usona registaro alportas koran saluton al la Kongreso kaj al D-ro Zamenhof. Li esprimas la deziron, ke multaj esperantistoj venu la proksiman jaron al la Sesa Kongreso en Ameriko. La Usonanoj penas egali la ĝisnunajn kongresojn. Rapide kreskis la nombro de la esperantistoj en Usono, kaj se multaj venos en Amerikon, oni ankaŭ povos montri al ili multajn tieajn esperantistojn.

S-ro Schiebe, oficiala delegito de la Norvega registaro ne povis veni al la Kongreso. Li estas malsana kaj sendis senkulpigan telegramon.

S-ro Kubiček (bohemo) en la nomo de la bohemaj esperantistoj esprimas grandan saluton al D-ro Zamenhof kaj al la Kongreso. La bohemaj esperantistoj ĉiam fidele konservadas kaj konservados nian netuŝeblan karan lingvon kaj laboros por la progreso de nia afero. Grandan progreson faris dum la lasta jaro la Bohema Unio Esperantista. Ĝi nun enhavas preskaŭ 50 grupojn kaj societojn. S-ro Kubiček fine invitas iun venontan kongreson en la urbon Praha. Ĝis la revido en Praha!

S-ro Keating (brazilo) je la nomo de la Brazila esperantistaro salutas D-ron Zamenhof kaj la tutan Kvinan Kongreson.

S-ro Mudie (brito): Por la kvina fojo Granda Britujo sendas lian voĉeton, por saluti D-ron Zamenhof. La kvinan fojon li vidas la esperantan kongreson. En la nomo de la Britoj li dankas la reĝon, la registaron kaj la urbon. Poste li sciigas pri la lastatempaj grandaj progresoj de Esperanto en Britujo. Li estas feliĉa ilin raporti al la Kongreso, sed nun havas malgajan senton: Kolonelo Pollen, la amata estro de la Britaj esperantistoj, ne estas tie ĉi (*Aplaŭdoj*). Li estas kontenta, ke oni aplaŭdas lian nomon. La Prezidanto de la Brita Asocio forestas pro Esperanto. Oni deziris, ke li iru en Amerikon, kaj tie li faras bonan laboron por nia lingvo. — Kiel delegito de Malta S-ro Mudie donas koran saluton al la Kongreso kaj certigon pri neŝanceblebla fideleco.

S-ro Edward por la dua fojo alportas al la Kongreso kaj al D-ro Zamenhof koran saluton de la samideanoj en Gibraltaro. Li diras, ke ĉar ilia urbo estas malgranda, la tieaj esperantistoj entreprenis propagandi Esperanton ĉe la turistoj kaj por tio eldonis gvidlibreton, kies ekzempleron li donas al D-ro Zamenhof.

S-ro Wilson havas la honoron paroli por Skotlando, la lando de la eriko, de la montoj kaj rapidaj riveroj. Lia saluto estas kiel la eriko — pura; la lojaleco de la skotoj estas kiel la montoj — ĉiama kaj forta; la esperanta movado en Skotlando estas kiel la riveroj — vivplena. (*Aplaŭdado*).

S-ro Henrichsen (dano) raportas pri la esperanta movado en Danujo. Tie nun estas sep societoj. Je la Sesa li raportos pri tio pli detale.

S-ro van Frenckell (finlandano) alportas al la sudo

saluton de la plej norda lando. Lia lando ŝajnas esti malvarma; sub tiu eksteraĵo sin kaŝas varma koro plena de amikeco kaj fideleco. Oni komisiis lin precipe esprimi kaj konfesi fidelecon al nia Esperanto.

Pastro Parker (irlandano) en la nomo de Irlando salutas la naciaron kunigitan en la Kongreso. Li salutas kaj gratulas la geidojn de Hispanujo, kie li pasigis sian junecon. Li salutas ilin kaj iliajn gereĝojn, kaj ilin gratulas, ĉar en la tempoj antikvaj ilia lando gastigis Kristoforon Kolumbon. Nun ili nutras la ideon de alia Kristoforo Kolumbo, nia Majstro. Laste, sed plej kore, li salutas D-ron Zamenhof per ĉiuj fortoj Irlandaj. Dio gardu Zamenhof kaj Esperanton!

Pastro Richardson reprezentas la Belgan esperantistaron. Dum preskaŭ du jaroj la esperanta movado treege suferis en Belgujo. Sed nun la Belgaj esperantistoj, memorante pri la devizo « Unueco donas fortecon », decidis kunigi siajn fortojn. Iliaj laboroj bonege sukcesis, kaj la Belga Ligo Esperantista estas nun pli forta, ol iam. Ĝi organizis en Verviers la unuan belgan kongreson, kiu aldonis al la regularo de la Ligo la jenan paragrafon: « Ĝi nur propagandas la lingvon internacian, kiel ĝi estas elpensita de D-ro L. L. Zamenhof kaj kies evolucion la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio difinos ». Estis nur unu voĉo kontraŭ tiu ĉi aldono. Bona afero ankaŭ estis la fondo de l'gazeto *Belga Esperantisto*, kiu fariĝis oficiala organo de la Ligo. Finante, Pastro Richardson deziras plenan sukceson al la Kvina Kongreso kaj esprimas koran saluton al D-ro Zamenhof, kies nomo estas sur la lipoj kaj en la koro de ĉiuj esperantistoj.

S-ro Decourt salutas la Kongreson en la nomo de la francaj esperantistoj.

S-ro Perogordo alportas la koran saluton de la Hispana Societo por Propagando de Esperanto. Li diras, ke, bedaŭrinde, ĝia prezidanto, S-ro Codorniu estas nun malsana kaj tial ne povis veni.

S-roj Allende kaj Braga (hispanoj) iom mallaŭte parolas, kaj ilia voĉo tute perdiĝas en la vastega halo, kie forta voĉo estas nepre necesa, por esti klare aŭdata.

S-ro Bremon y Masgrau salutas la Kongreson en la nomo de la kataluna esperantistaro, kiu celas okupi la unuan lokon en la batalado por Esperanto.

S-ro Aguilar, reprezentanto de la Valencia lingvo kaj de la urbo Valencio parolas longe, sed ne aŭdeble.

S-ro Arnhold (germano) en la nomo de ĉiuj germanaj esperantistoj kore dankas por la Kvara Kongreso. Estas eco de la germanoj, ekzameni diligente, — eĉ eble *tro* diligente, — la aferojn, antaŭ ol aliĝi al ili ; sed poste ili kore kaj fidele laboras por ĝi. La kvara Kongreso tion montris : post ĝi aliĝis multaj novaj esperantistoj. Germanujo antaŭ la Kongreso havis proksimume nur 60 esperantistajn societojn kaj apenaŭ kuraĝis inviti la Kongreson. Nun ĝi havas preskaŭ 200 societojn, kaj la germanoj povas nun marŝi en la unua vico kun la francoj kaj la britoj. La germanoj kore salutas D-ron Zamenhof kaj la Kongreson, kaj forte promesas neniam ĉesigi la laboradon ĝis la bela fina venko !

S-ro Vermaas petas senkulpigon, ĉar pro malvarmumo lia voĉo ne estas tre klara. Li salutas la Kongreson en la nomo de la holandaj esperantistoj. Ilia lando estas malgranda, sed tre fidela parto de la esperantistaro. Li esperas, ke, trapasante Holandon la kongresanoj tie faros efikan propagandon.

S-ro Marich alportas la saluton de la hungaraj esperantistoj. Li raportas la pri ĵusa XVI-a Internacia Kongreso de Medicino en Budapest, en kiu Esperanto estis oficiale akceptita kaj dum kiu 83 esperantistaj kuracistoj havis apartajn kunsidojn.

S-ro Tellini (italo) salutas D-ron Zamenhof kaj ĉiujn gefratojn. Li samtempe esprimas koran deziron por la sukceso de la Kongreso. Li oficiale reprezentas la Akademion *Ateneo* en Brescia. Li raportas pri la ekspozicio en Bologno, kiu oficiale uzis Esperanton por siaj rilatoj kun fremdlandanoj, kaj diras, ke nun okazas esperantaj kursoj, aprobitaj de la ministro por instruistoj.

S-ro Albiñana salutas la Kongreson en la nomo de la Respubliko Argentino.

S-ro Grabowski (polo) en la nomo de siaj samlandanoj eldiras la sekvantan saluton :

« Karaj Samideanoj !

El la malproksima Polujo, el Varsovio, la estonte fieraj lulilo de Esperanto, mi alportas korajn salutojn al la bela ĉefurbo Barcelono, al Katalunujo, al la tuta suna Hispanujo, al ĉiuj nacioj, reprezentataj tie ĉi per milo da siaj plej noblaj filoj.

La nomo de Hispanujo rememorigas al ni, Poloj, pasintajn tempojn, kiam antaŭ 100 jaroj, *genio de l' milito*, Napoleono, volis kunigi la popolojn sub sia sceptron.

Tiam niaj prapatroj mortadis heroan morton sub la muroj de Saragoza kaj en la intermontoj de Samosierra.

Hodiaŭ alkondukis nin en la pirineajn landojn la *genio de l' paco*, D-ro Zamenhof, kaj ni ĵuras al nia kondukanto, ke ni restos al li *same* fidelaj, ĝis la lasta spiro, ĝis la fina venko.

Ni vidas jam klare la tagiĝon de la granda ĉiuhoma interfratiĝo sur la fundamento de Esperanto, kaj ni iras kurage kun niaj diverslandaj samideanoj, kurage antaŭen por unuigi la tutan homaron.

Vivu nia nobla Majstro, vivu la Esperantistaro ! »

S-ro Ostrovski (ruso) diras, ke rusoj el tre malproksimaj landoj lin komisiis alporti al la Kongreso saluton kaj bondezirojn. Por tio li ne bezonas serĉi vortojn, sed nur aŭskulti la sonojn de sia koro : Vivu amo kaj paco de la homaro ! Vivu ĝia fonto, nia kara lingvo ! Vivu ĝia kreinto ! Vivu vi, samideanoj !...

S-ro Ciklari (georgo) venis el malproksima Oriento, inter Nigra maro kaj Kaspia maro. Lia lando estas malgranda, sed enhavas grandan esperantistaron. Por veni al la Kongreso li trairis multajn landojn nur per Esperanto. Al la Kongreso kaj al D-ro Zamenhof li esprimas plej koran saluton.

S-ro Stamatiades raportas pri la esperanta movado en Samos. Tie oni unue persekutis Esperanton, kredante ĝin kontraŭa al la religio. Nun la eraro kompreniĝis kaj la Samosa Esperanta Societo reviviĝis kun alta protekto de la tiea princo, en kies presejo senpage presiĝas *Greklingva Esperantano*.

S-ro Privat, salutinte la Kongreson, per kiu enskribiĝis kvina nomo sur la verda standardo, parolas pri la esperanta propagando en Svisujo : neniu eliras el Svisujo, ne aŭdinte pri Esperanto. Li sciigas, ke la unuan fojon en la Kongreso de Psikologio, ĵus okazinta en Genevo, oni ne nur akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon, sed efektive ĝin uzis en la kunveno. Li dankas D-ron Zamenhof, ke li por ĉeesti niajn ĉiujarajn kunvenojn, preterpasas la malagrablojn de la honoroj. Li esprimas fine ankaŭ dankon al la urbo Barcelono, kiu donas poezion al la Kongreso.



S-ro Auguste Carrère alportas varman saluton e Koŝinhinujo, ĉar varma ankaŭ estas tiu lando.

S-ro Jacques Guéron: lia ĝojo estas tre granda, lia koro tremas kaj lia voĉo malfortiĝis; el Turkujo, nova Babela Turo, saluton!

S-ro Arthur Baker diras, ke en Ameriko estas kunfandiĝo de sangoj; en ĝi eble ankaŭ estos komenciĝo de la kunfandiĝo de la homaro. Li esperas, ke ĉiuj Barcelonaj kongresanoj venos al la Sesa Kongreso en Usono, por vidi ĝian komenciĝon.

Post tiu ĉi longa serio da salutoj, S-ro Chavet legas multajn ricevitaĵajn telegramojn: de la oficiala delegito de Norvegujo, S-ro Schiebe, kiu pro malsano ne povis veni; de S-ro A. Michaux, la neforgesebla organizinto de nia unua Kongreso: « Senkulpigu foreston. Mia saneco ne permesas ĉeesti. Nepre mi ĉeestos la Sesan » (*Aplaŭdo*); de J. Borel, de S-ro Emmanuel Reicher kaj F-ino Edwige Reicher, la triumfaj ludintoj de *Ifigenio* en Dresdono; de Adamo, Sofio kaj Lidio Zamenhof, gefiloj de nia amata Majstro; de S-ro Lucien Cornet, franca deputato, kiu proponis al la franca registaro oficialan akcepton de nia lingvo; de D-ro Robin, el Rumanujo, kiu sciigas, ke la reĝino Carmen Sylva promesis lerni Esperanton; de la grupo en Shanghai (Ĥinujo) kaj de multaj aliaj diverslandaj grupoj kaj societoj. S-ro Chavet fine sciigas, ke la Lingva Komitato kunvenos morgaŭ matene.

Tiam levigas D-ro Zamenhof: Li tre bedaŭras, ke li devas nun anonci ion malĝojan. Antaŭ kelkaj tagoj, dum la veturado al la Kongreso, mortis F-ino Marie Schröder, konata dana esperantistino. Vizitante montaron en Svisujo, ŝi malfeliĉe falis en abismon. D-ro Zamenhof proponas, ke la kongresanoj honoru ŝian memoron per levigo de siaj seĝoj kaj ke oni sendu kondolencan telegramon al la patrino de nia mortinta samideanino.

S-ro Pujula, prezidanto, fine fermas la kunsidon, kaj sciigas, ke hodiaŭ posttagmeze, anstataŭ la programa daŭrigado de la malferma kunsido, estos labora kunsido.

Laŭ lia propono oni ĥore kantas « La Esperon », kaj la kunsido finiĝas je la dekdua kaj dek minutoj.

Je la tria posttagmeze, labora kunsido en la Palaco de la Belartoj.

S-ro Pujula, prezidanto, malfermas la kunsidon kaj legas la tekston de la telegramoj, senditaj al la reĝo, al la ministroj kaj al S-ino Schröder.

D-ro Mybs petas, ke oni ankaŭ sendu telegramon al la reĝo de Saksujo, en dankamemoro por la Kvara Kongreso.

S-ro Chavet legas kelkajn nove alvenintajn telegramojn.

S-ro Pujula proponas, ke oni sendu telegramon al S-ro Codorniu, prezidanto de la Hispana Societo por Propagando de Esperanto, kiu pro malsano ne povis veni al la Kongreso.

S-ro Chavet sciigas, ke kvar novaj delegitoj petis parolon.

La unua, S-ro Gottschall, parolas en nomo de germanlingvaj aŭstroj; la dua, S-ro Tiller, en nomo de Svedoj; la tria, S-ro Ferry, por Dalmatujo kaj kroata lingvo; la kvara, S-ro Schwarz, por Bosnio kaj Herzegovino. Parolas ankaŭ S-ro Wicart en nomo de la Konfederacio de la francaj grupoj de komerco kaj industrio.

S-ro Chavet legas proponatan tagordon, kaj laŭ ĝi efektive tuj komenciĝas la labora kunsido.

S-ro Mann komunikas « kelkajn principetojn de propagando », inspiritajn de lia persona sperto kaj de lia kompreno de Esperantismo:

1-e : Ĉiu esperantisto devas esti propagandisto : ne nur Esperantisto *ŝatanta*, sed Esperantisto *propagandanta*. En la rilato propaganda, Barcelonaj spertoj en kafejoj, stacidomoj, k. c. montris, ke restas ankoraŭ multe da laboro farota. — Ankaŭ ĉiu *esperantistino* devas propagandi, laŭ la bonegaj ekzemploj de S-ino Marie Hankel, F-ino Lawrence, Baronino de Ménil, F-ino Zabilon d'Her, k. a. Pli alloga certe estas la propagando de niaj samideaninoj.

2-e : Oni propagandu Esperanton *ĉie*, inter amikoj, sur la stratoj, en vagonaroj, en la Londona subtera « tubo », ĉe specialistaj internaciaj kongresoj, k.t.p.

3-e : Oni propagandu *liberale*. La Deklaracio diras, ke « Esperantisto estas tiu, kiu uzas la lingvon, tute egale por kiu ajn celo li ĝin uzas ». Tion inspiris liberaleco. La sama liberaleco inspiru nian propagandon; ĝi estu demokrata, lasante tute liberan vojon al individua entuziasmo kaj farmaniero; tro da aprioria centralizemo mortigas individuan

fervoron kaj iniciatemon, Kompreneble, ĉiu forta homo volas direkti kaj administri por la bono de nia komuna afero, sed oni ne forgesu jenan principon :

4-e : Ni ĉiam diradas: « Ni restu fidelaj » al la Majstro. Kion signifas ? Fidelaj al lia *modesteco*. Ni forigu de nia propaganda klopodado ĉiujn ne-esperantismajn personajn malgrandecojn.

5-e : Nin ĉiam inspiru la interna ideo de la Esperantismo: amo, paco kaj gefrateco sincera.

6-e : Ni iom ŝanĝu por nia celo la devizon de la Majstro : « Ni trankvile iru nian vojon ». Interne trankvile ja, sed ekstere *plej energie* ni iru nian vojon.

Se ni nur forportos el la Kongreso fervoron tiel varmegan, kiel la varmega suno, kiu nin ĉi tie en Barcelono bakas, ni nepre fandos ĉiujn korojn en favoron al Esperanto

S-ro Blaise parolas pri propagando inter komercistoj. Kiam oni skribas al komercaj firmoj en Esperanto, aldonante al sia letero Ĉefeĉan ŝlosilon, oni preskaŭ ĉiam ricevas respondon, se ne en Esperanto, almenaŭ en nacia lingvo. Li povus citi nomojn de firmoj, kiuj tiel faris grandajn aferojn. Li insistas pri la utileco de la ŝlosiloj kaj de la Ĉekbanko Esperantista por la Esperanta propagando kaj pri la neceseco helpi tiun ĉi lastan institucion.

S-ro Mudie montras, kiel granda estas la facileco pro-propagandi per Ĉefeĉaj ŝlosiloj dum la vojaĝo al la Kongreso. Persone li disdonis dum sia Kongresa vojaĝo almenaŭ 300 ekzemplerojn de tiu utilega broŝureto. Ni ne perdu okazon propagandi ankaŭ tie ĉi en Barcelono en kafejoj, promenante sur la Rambloj, k. t. p. Li proponas devizon kun nova vorto (la Majstro ne kreu lin reformema !): « *Ramblante*, ni propagandu ! »

S-ro Cart rakontas, ke, ekskursante, li trovis sur alta monto, je pli ol 2000 netroj super la maro, ŝlosilon de Ĉefeĉ. Eble tie jam « semis » S-ro Mudie ? Utilege estus meti anglajn libretojn pri Esperanto en la bibliotekojn de Svisaj hoteloj. Tie dum pluvaj tagoj ilin trovus la multaj angloj, kiuj ĉiujare vizitadas Svisujon.

S-ro Allende, el Bilbao, diras, ke la esperantistaj gazetoj devus esti redaktitaj nur en Esperanto, sen naci-lingva traduko apud la esperantaj artikoloj. Li ankaŭ

raportas pri sia persona sperto rilate al farotaj respondoj, kiam gazetoj atakis aŭ kritikis Esperanton.

S-ro Privat opinas tute male pri la esperantistaj gazetoj. Forigo de naciaj lingvoj povus kredigi, ke Esperanto volas ilin anstataŭi. Due, en esperanta gazeto nur por nacioj povus fine kreiĝi dialektoj (1).

S-ro Chavet legas proponon de « Centra Komercejo por Esperantujo » pri signo esperantista, ebliganta distingi la naciecon de l' portanto per aldono de nacikolora radiaro al la esperantista verda stelo. Li memorigas, ke dum la Kvara Kongreso oni jam prezentis similan proponon kaj konsilis, ke oni distingu la naciecon almenaŭ dum la Kongresoj. Tion ĉi oni faris en Barcelono per aldono de ruĝaj rubandoj sub la arĝentan signon.

S-ro Diemer, el Köln, prezentas grandan kartonan stelon por afiŝi sur fenestroj de vagonoj, magazenoj, loĝejoj, k.t.p. Per tia signo sur fenestaro de vagono oni ekzemple tuj povus sciigi, ke en ĝi troviĝas iu esperantisto, kiun oni plezure renkontos.

S-ro Steier, proponinto de la steloj kun nacikoloraj radioj, montras la utilecon de tiu signo, precipe en internaciaj kongresoj.

S-ro Pichon parolas kontraŭ rezervitaj fakoj en vagonoj. Tio incitus malplezuron kaj jaluzon de aliaj vojaĝantoj kontraŭ esperantistoj. Plie, vojaĝado en ne-rezervitaj fakoj donas eblecon varbi el la kunvojaĝantoj novajn esperantistojn.

La proponinto de la « survagonigebla » stelo respondas, ke tre saĝaj estas la rimarkoj de S-ro Pichon. Sed li tute ne parolis pri specialaj rezervitaj fakoj. Li nur citis kiel ekzemplon de la utileco de liaj steloj la eblecon sciigi, ke iu samideano troviĝas en iu fako de vagono.

S-ro Chavet legas proponon de la grupo en Godesberg am Rhein pri libertempa esperanta restadejo, La proponantoj studas, kiajn kondiĉojn devas plenumi tia restadejo kaj montras, ke ilia urbo ilin plenumas perfekte. — S-ro Chavet poste sciigas, ke la morgaŭa kunsido de la Lingva Komitato ne okazos en la Palaco de la Belartoj, sed en la Univer-

---

(1) Oni ankaŭ rimarku, ke kompara legado de sama artikolo en Esperanto kaj nacia lingvo estas certe unu el la plej bonaj metodoj de lernado, kiun tute ne povas anstataŭi teoria studado de gramatikoj kaj lernolibroj.

sitato. Tuj okazos kunveno de la Organizaj Komitatoj en apuda ĉambro.

S-ro Duviard anoncas morgaŭan kunsidon de junuloj, S-ro Mudie morgaŭan kunsidon de la U. E. A., kaj S-ro Privat kunsidon pri la Internacia Instituto de Esperanto, kiu okazos morgaŭ en la paraninfo de la Universitato, tuj post la kunsido de la U. E. A.

La kunsido finiĝas je la kvina.

Vespere okazis je la 10-a, en la teatro *Romea*, tre interesa koncerto de la Esperanta Vagabonda Klubo.

\*  
\*   \*  
\*

Mardon, 7. Septembro, je la 9-a matene, kunsido de la Lingva Komitato en la Universitato. <sup>(1)</sup>

Je la 10-a, kunveno de la U. E. A. en la paraninfo de la Universitato.

S-ro Mudie, prezidanto, malfermas la kunsidon. Li ĝoje konstatas, ke la kongresanoj grandanombre ĉeestas, kaj salutas ĉiujn membrojn kaj amikojn. La progresoj faritaj dum la jaro estas pli grandaj kaj pli gravaj, ol la plej entuziasma povis esperi; kaj egale kontentigaj estas la gravaj servoj, kiujn la U. E. A. faradas. — Aludante la tragedian morton de F-ino Schröder, reprezentantino de la U. E. A. en Kopenhago, S-ro Mudie anoncas, ke oni sendis kondolencan telegramon al la kompatinda patrino. — Estas por la U. E. A. granda honoro havi la amegatan majstron kunsidantan. — La ankoraŭ juna organizacio enhavas 3000 membrojn, kaj la nombro de la delegitoj kaj subdelegitoj kreskis ĝis 700. Aliĝis 80 «Esperantiaj» entreprenoj. Kun granda kontenteco oni vidas, ke la komerca mondo ekkonstatas la altvalorecon de la servoj, kiujn la U. E. A. povas doni al ĝi. — Finante, S-ro Mudie transdonas al la U. E. A. sian oficon, sed aldonas, ke li ĉiam konservos sian entuziasmon kaj sian pretecon doni al ĝi pliajn servojn <sup>(2)</sup>.

(1) Plenan raporton pri la kunsidoj de la Lingva Komitato ni publikigos en la Novembra numero.

(2) La raportanto tre kore dankas S-ran Rhodes por tiuj ĉi notoj pri la parolado de S-ro Mudie, kiun li ne povis mem aŭdi, ĉar li ankoraŭ troviĝis ĉe la ne finita antaŭa kunsido de la Lingva Komitato.

S-ro Hodler, vicprezidanto kaj administra fakestro de la U. E. A., poste legas sian jaran raporton pri la agado de la Asocio. Ĝi dividiĝas en ok fakoj: Administrado, Financoj, Esperanto-Oficejoj, Konsuloj, Turismo, Komerco, Junuloj, Aerveturado.

Post tiu tre interesa kaj multe aplaŭdita raporto, S-ro Mudie legas la telegraman respondon de la reĝo al la saluto de la kongresanoj.

Tiam D-ro Zamenhof siavice starigas kaj eldiras la sekvantan paroladon, kies teksto estis poste restarigita:

Estimataj membroj de U. E. A.,

S-ro Mudie, via prezidanto, petis, ke mi diru ĉe via kunveno kelkajn vortojn de laŭdo aŭ mallaŭdo pri la agado de via Asocio. Ĉu mi esprimos laŭdon aŭ mallaŭdon, la respondo ne povas esti duba: post la tiel bonaj kaj gravaj raportoj, kiuj estis legitaj, post la agado, kiun en la daŭro de la lasta jaro estis plenumita de U. E. A., ne povas resti eĉ la plej malgranda dubo pri tio, ke, lasante flanke la instituciojn oficialajn, U. E. A., fariĝis la plej grava institucio de nia movado kaj ĝi al nia afero alportos pli kaj pli da utileco.

Antaŭ kvin jaroj, ĉe la Bulonja Kongreso, estis prezentita projekto de ĝenerala organizaĵo por la tuta Esperantistaro. La Kongreso tiam ne volis tiun projekton kaj per deklaro difinis, ke estas nomata Esperantisto ĉiu persono, kiu scias kaj uzas Esperanton tute egale por kiaj celoj kaj ke nia movado ne estas oficiale ligita kun ia speciala idealo, kvankam la plej multaj el la Esperantistoj ja sentis tiun idealon kaj estis konstanta gvidataj de ĝi. Sed kelkaj Esperantistoj havis la bonan ideon fari per vojo privata tion, kion oficiale fari ni ne povis. Ili kunigis ne ĉiujn Esperantistojn, sed nur tiujn personojn, kiuj, akceptinte la internan ideon de Esperantismo, deziras esti unuigitaj en internacia organizaĵo, por reciproka sinservado kaj alproksimiĝado, ĉar ili pensas, ke ili tiamaniere pli kaj pli multigos inter si ligilojn de solidareco kaj sian celon atingos pli rapide, ol per izola agado.

U. E. A. unuigas do ne ĉiujn Esperantistojn, sed ĉiujn Esperantistojn, t. e. ĉiujn tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur Esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon. Ke la pli granda parto de la Esperantistaro konsentas kun tiu ĉi ideo pravas la fakto, ke en malmulte da tempo via Asocio ricevis la plej favoran akcepton en nia movado. Oni ĉie komprenas, ke U. E. A. liveras taŭgan neŭtralan fundamenton por ĉiuj interhomaj rilatoj kaj servoj, kaj el tiu ĉi reciproka sinhelpado rezultos pli da amikeco kaj estimo inter la gentoj, kaj foriĝos la baroj, kiuj malhelpas ilian pacan interkomunikiĝon. En tiu ĉi principo kuŝas la ĉefa graveco de via Asocio.

Dum la oficiala Esperantistaro, laŭ la deklaro de Boulogne, estas devigata al plena neŭtraleco rilate al tio kaj devas sin limigi nur al pure Esperantaj demandoj, U. E. A., ĉar ĝi reprezentas nur personojn, kiuj deziras esti organizitaj por difinita celo aprobita de ili, povas fari gravan laboron, kiu havos grandan signifon rilate al la interna ideo de Esperantismo.

Mi do estas plene konvinkita pri la utileco de via Asocio kaj la Esperantisma karaktero de la laboro, kiun ĝi jam plenumis kaj ankaŭ plenumos. Mi fine sentas la devon gratuli kaj danki la sindonajn fondintojn de U. E. A., kiuj per sia obstina laboro kaj penado povis alkonduki tiun institucion sur la bonan vojon, kie ĝi nun staras. Mi de via Asocio atendas multe da bono por nia afero, kaj mi tutkore esperas, ke U. E. A. faros ĉiam pli gravajn progresojn kaj per sia rapida plifortikiĝo nin ŝovos antaŭen al la baldaŭa realigo de Esperantismo.

Longa aplaŭdado sekvas tiun ĉi belan paroladon.

S-ro Rousseau poste legas raporton pri la financa stato de la Asocio.

S-ro Mudie proponas elekti du delegitojn kiel kontrolistojn. Li poste legas le premiaron de la diversaj konkursoj, starigitaj de la U. E. A.

S-ro Hodler fine sciiĝas pri la labora kunsido de la Asocio, kiu okazos vendredon, je la tria.

\*

\* \*

Tuj post la kunveno de la U. E. A. sekvas en la sama loko kunveno pri la Internacia Instituto de Esperanto. Sur la estrado : D-ro Zamenhof, Prof. Cart, Rektoro Boirac, Generalo Sebert, S-roj Ostrovski, Grabowski kaj aliaj.

S-ro Privat, prezidanto de l'Instituto, salutas kaj dankas D-ron Zamenhof kaj la tutan ĉeestantaron. Li unue esprimas bedaŭron, ke ne povis okazi la anoncitaj kursoj, pro la politikaj okazoj en Barcelono, kiuj malhelpis ilian organizadon. Tamen estis sufiĉe da enskribiĝoj, kaj por ilia aliĝo S-ro Privat tre dankas la enskribiĝintojn. En la venonta jaro ili sendube estos pli feliĉaj, kaj kursoj de la Instituto povos okazi dum la semajno antaŭ la Kongreso. — S-ro Privat poste klarigas la fundamentajn principojn, laŭ kiuj gvidiĝas kaj laboras la Instituto.

Li deziras deklari unu fojon por ĉiam, ke la Instituto konsideras Esperanton *vivanta lingvo de vivanta popolo*.

(Apl.). Oni ofte diris, ke nia lingvo estas artefarita kaj seka fabrikaĵo, ke ĝi ne povos vivi, ĉar ĝi ne povos havi literaturon, ke lingvo povas vere vivi, nur se ĝi havas popolon por ĝin paroli kaj kanti kun amo kaj poezio. Jes, efektive, ĉiu lingvo vivanta havas propran spiriton, ĝi reprezentas la sentojn kaj ideojn de la popolo, kiu ĝin parolas, kaj lingvo povas vivi nur per tiu propra spirito, kiu kreas ĝian literaturon. Pro tio, se D-ro Zamenhof estus nur lingvisto, li estus kreinta artefaritan lingvon, kiu eble restus senviva teoria projekto, kiel tiom da aliaj. Sed antaŭ ol esti lingvisto kaj vere antaŭ ĉio, nia Majstro estas *homo*. (Apl.). En nian lingvon li jam de la komenco enblovis *homan* spiriton. En ĝi li verkis *homajn* poemojn. Kun ĝi li ligis grandan ideon kaj noblan senton. Tiel, kune kun la lingvo, li fondis popolon kaj, laŭ sia propra konfeso, li fondis la lingvon nur pro kaj por tiu nova popolo. Kaj tiu popolo nun vivas kaj kreskas ĉiujare. Ĝi estas ni, esperantistoj ĉiulandaj, kiuj amas Esperanton, ĉar ĝi simbolas nian internan ideon kaj celon. (Apl.).

Kiu studis la historion de la lingvoj, tiu scias, ke la lingvoj vivas kaj evolucas nur dank' al *sentaj* movadoj, neniam dank' al decidoj de lingvistoj. Ĉiu scias, kiel la potenca movado komencita de Luther en Germanujo progresigis la germanan lingvon, dum samtempe ĝi transformis muzikarton kaj kantadon. Kiu konas la historion de la franca lingvo, tiu bone scias kiel, ĉe la komenco de la lasta centjaro, Chateaubriand, per enkonduko de « nova sento » en la literaturon komencis la grandan sentimental-an movadon, kiu tiel riĉigis la francan lingvon kaj baldaŭ donis al ĝi Victor Hugo kaj lian skolon.

Nu, ĉu la unua verso de nia amata himno ne estas :  
« En la mondon venis nova sento... » ?

Jes, tiu « nova sento » estas la kaŭzo, kial nia lingvo allogis tiel fervoran armeon de adeptoj. Tiu « nova sento » donas al la esperantista popolo ĝian entuziasmon, ĝiajn kantojn, ĝian poezion, ĝiajn simbolojn, ĝian literaturon, unuvorte ĉion, kio faras la vivon de iu nacia lingvo. (Apl.). Same kiel patriotismo kreskigas — kaj eĉ kelkfoje revivigas — naciajn lingvojn, same nia esperantismo, kiun simbolas la verdstela flago, kreskigas kaj vivigas nian karan lingvon.

Sed dum ofte la nacia patriotismo devigas homojn mal-



ami aliajn naciojn kaj aliajn lingvojn, nia internacia kaj pura esperantismo nur igas nin ami ĉiujn popolojn kaj iliajn lingvojn. (Apl.).

Tiel ĉiu homo povas — kaj ĉiu ja devus — ami samtempe sian nacian lingvon por sia kara patrujo kaj Esperanton por la tuta homaro.

Tiuj ideoj kaj sentoj ja kreis nian ankoraŭ malgrandan literaturon kaj, de dudek jaroj, sur la lipoj kaj sub la plumo de l'esperantistoj, nia lingvo viviĝis kaj kreskis ĉiutage pli kaj pli. Ĝi nun estas vere vivanta lingvo, kiu komencis saman naturan evolucion kiel la aliaj lingvoj kaj kiun de nun neniu en la mondo povas arbitre tuŝi. (Apl.).

Nun, ke tiun rezulton ni suldas sole kaj entute al la interna ideo kaj spirito de Esperanto, tion ĉiam memoru bone ĉiuj, kiuj lernas nian lingvon, eĉ se ili ne komprenas aŭ ne akceptas tiun senton de l'esperantismo. (Apl.).

Oni devas gratuli la organizintojn de la Floraj Ludoj, ke ili ĉe tiu kongreso donis novan kuraĝigon al esperanta verkado, kiu espereble ĉiam pli kaj pli riĉigos nian lingvon per bela kaj forta *originala literaturo*. Ankaŭ oni devas danki al tiu admirinda organizaĵo U. E. A., kiun D-ro Zamenhof nomis « la vera realigo de esperantismo », kaj kiu fariĝis la plej firma garantio kontraŭ ĉiuj atakoj al nia lingvo. (Apl.).

Nia lingvo estas sur plej bona vojo. Ni povas iri antaŭen kun plej plena fido kaj renovigita kuraĝo, ĉar en niaj koroj kuŝas nun definitiva certeco pri la vivo de Esperanto.

Vivos Esperanto por la bono de l'homaro. (Longa apl.).

Poste S-ro Privat daŭrigas, donante kelkajn sciigojn pri la agado de l'Instituto dum la pasinta jaro kaj dankante siajn afablajn kunlaborantojn, speciale nian esperanto-verkistinon S-inon Milsom (E. Ramo) kaj ankaŭ D-ron Ostrovski.

La Instituto celas kuraĝigi bonan kaj profundan studadon de nia lingvo en la diversaj landoj. Ni nun devas prepari bonajn instruantojn, kiuj konu ne nur la lingvon sed ankaŭ ĝian literaturon.

La diplomoj de l'Instituto neniel konkurencas la diplomojn de naciaj societoj, ĉar ĝiaj ekzamenoj estas farataj laŭ absolute malsama vidpunkto.

La Instituto devis tiun ĉi jaron komenci respondadon al multaj demandoj pri sintakso, vortaro, k. t. p., kaj ankaŭ

konsiladon al instruantoj de kursoj. Ĝi speciale zorgis por enkonduki pli bonan instruon de la elparolado, kiu ankoraŭ nun estas tute malĝuste montrata en kelkaj naciaj lernolibroj.

Ĝi ankaŭ klopodis disvastigi pli simplan klarigon pri la akuzativa uzado, kiu ofte fariĝas malfacila nur pro la malklareco de l'instruado.

La Instituto esperas, ke baldaŭ oni povos organizi intersanĝon de instruantoj de lando al lando por helpi al pli granda unueco.

La internacia oficejo de l'Instituto en Genevo (1) plezure donos detalajn informojn pri tiuj aferoj.

Pri la ekzamenoj, S-ro Privat klarigas, ke nur por la *Atesto pri Studado* (I) oni povas ekzameniĝi koresponde. Por *Atesto pri Kapableco* (II) kaj *Profesora Diplomo* (III) oni faras koresponde la skriban parton de l'ekzamenoj kaj la parolan parton oni plenumas ĉe la filioj de l'Instituto aŭ antaŭ specialaj juĝantaroj elektitaj de l'Instituto en diversaj landoj.

Finante, S-ro Privat cedas la parolon al nia Majstro, tutkore dankante lin, ke li bonvolis ĉeesti.

Dum forta aplaŭdado starigas D-ro Zamenhof, kiu ŝajnis tre kortuŝita kaj ofte aplaŭdis dum la ĵus finita parolado.

Li antaŭ ĉio deziras diri sian admiron al la elokventa parolado de S-ro Privat kaj li opinias, ke li esprimos la senton de la tuta ĉeestantaro, dankante lin pro lia bonega klarigo pri la vivo de nia lingvo. Poste D-ro Zamenhof gratulas la Instituton pro la bonaj atingitaj rezultatoj kaj deziras al ĝia utila agado ĉiam pli grandan sukceson. Li esperas, ke ĝi iam fariĝos unu el niaj oficialaj institucioj. Ĝis tiam li deziras nur diri, ke al instituto, kiun gvidas tiel lerta esperantisto kaj tiel kompetenta persono kiel nia amiko Privat, al tia instituto la tuta esperantistaro povas ĉiam havi plenan kaj konstantan fidon. (Apl.).

Post la kunveno, pli ol tridek kongresanoj enskribiĝis por la parola ekzameno de l'II<sup>a</sup> aŭ III<sup>a</sup> diplomoj. Ĉiutage ĝis sabato, en ĉambro 10<sup>a</sup> de l'Universitato, ekzamenis la kandidatojn internacia juĝantaro konsistanta el : S-roj Prof. Cart, Corret, S-ino Marie Hankel (Gramatiko), S-roj Ostrovski,

(1) 19, Pont d'Arve, Genève.

Samuel Meyer kaj Kühnl (Literaturo), S-roj Hodler kaj Rousseau (Historio kaj organizaĵoj de esperantismo), S-roj Grabowski, Buttler kaj F-ino Jones (Modela leciono), S-roj Edmond Privat, Mann kaj Blaise (Metodoj de instruado.)

Dum la posttagmezo okazis diversaj fakaj kunsidoj aŭ laŭvolaj ekskursoj. Vespere la « Schola Orpheonica » donis belegan koncerton en la Palaco de la Belartoj.

\*  
\*   \*  
\*

Merkredon, 8. Septembro, je la naŭa matene, kunsido de la Lingva Komitato en la Universitato.

Je la 10-a, eksperimentoj de la Ruĝa-Kruco en la Parko. Jam dum la Dresdena Kongreso D-ro Thalwitzer organizis kun granda sukceso tian eksperimenton. En Barcelono ĝi estis ankoraŭ pli grava, kvankam la tieaj ruĝ-krucanoj ne sciis Esperanton. Ili komencis lerni nian lingvon, kiam ĉion interrompis la politikaj okazoj, dum kiuj ili mirinde plenumis sian utilegan oficon. Oni do interkonsentis, ke nur la portestroj parolos Esperante kun la vunditoj, kaj kvankam oni povis fari antaŭe nenian prov-ekzercon, la eksperimento plej bone sukcesis. Generalo Priou por ĝi varbis dum la Kongreso mem kuracistojn, portestrojn, flegistojn, flegistinojn, vunditojn, k. t. p., kiujn li kunigis la antaŭan vesperon ĉe la oficiala sidejo de la Ruĝa-Kruco en Barcelono, por klarigi al ili ilian morgaŭan oficon.

La eksperimento disvolviĝis tute ĝuste laŭ la antaŭpreparita programo, sub la direkto de D-ro Kuracisto J. M. Alvarez Miranda, kaj sub la kontrolo de S-ro Montaner, regiona delegito de la Hispana Ruĝa-Kruco en Katalunujo.

En vasta kampo, meze de la Parko, diskulis vunditoj, apartenantaj al la plej diversaj nacioj kaj elpensintaj al si mem pli malpli gravajn vundojn. Portistoj direktataj de esperantista portestro ilin levis sur portilojn kaj alportis al « pansloko », kie diversaciaj kuracistoj kaj flegistoj faris la unuan « pansadon », kaj surskribis « diagnozan karton », aligitan al la vesto de ĉiu vundito. Poste oni transportis la vunditojn ĝis ambulanco. Tie ili estis klasigitaj laŭ la diagnozaj kartoj. La plej grave vunditajn oni enlitigis aŭ kuŝigis sur aranĝitajn brakportilojn, dum la aliaj restis sur siaj portiloj, kiujn oni rekte almetis sur specialajn subportilojn. Fine estis

efektivigita ŝajnigo de forigado de vunditoj ĝis hospitalo, fervoja stacidomo, haveno, k. t. p. per vunditveturiloj kaj portiloj.

Ĉiuj partoprenantoj (krom sole la Barcelonaj portistoj) parolis nur Esperante. Ĉiuj ŝrankoj, skatoloj kaj diversaj ujoj, kiel ankaŭ kuraciloj kaj « pansaĵoj » surportis Esperantajn surskribojn, kaj ĉiuj diversnacioj dank' al Esperanto mirinde interkompreniĝis kaj facile povis esti flegitaj, kvankam inter ili estis francoj, katalunoj, germanoj, svisoj, angloj, amerikanoj kaj poloj.

Por tiu bonega elmonro de la utileco de Esperanto ĉe la Ruĝa-Kruco akceptu plej koran dankon la organizinto, Generalo Priou, prezidanto de la Societo Esperanto-Ruĝa-Kruco, kaj ankaŭ la Barcelona Ruĝ-Kruca Komitato, kiu ĉion plej afable faris por faciligi tiun tre interesan eksperimenton.

Je la 12-a okazis ankaŭ en la Parko ceremonio ĉe la statuo de Aribau, fama kataluna poeto, kiu kvazaŭ profete antaŭanoncis la iaman ekziston de lingvo internacia, pacigonta la homaron. S-ro Pujula faris Esperantan kaj katalunan paroladon; ankaŭ laŭdis D-ro Zamenhof la Barcelonan poeto-profeton. Poste oni malkaŝis metalan platon, tegitan per Esperanta flago kaj sur kiu oni legis « *La Esperantistoj dum la V-a Kongreso al Aribau, Barcelono 1909* ». S-ro Puig, vic-urbestro, dankis en la nomo de la urbo. S-inoj Zamenhof, Pujula kaj Sebert demetis grandajn bukadojn sur la monumenton; kaj la ceremonio finiĝis per granda ovacio de l' publiko al nia amata Majstro.

\*  
\*   \*  
\*

Je la 3-a posttagmeze Unuaj Esperantistaj Floraj Ludoj.

Por tiu bela festo la antikva gotika halo de la Borso, kie okazas ĉiujare katalunaj Floraj Ludoj, estis afable pruntita al la kongresanoj. Tute sama estis la dekoracio, samaj la ruĝaj drapiraĵoj, samaj la tapiŝoj, kiuj pendis de supera galerio, sama la trono de la Reĝino de la Festo.

Je la kvara eniras la urbaj kaj Esperantistaj eminentuloj kaj sidigas sur la estrado. Dekstre estas la Urbestro, kelkaj urbkonsilantoj kaj la Prezidanto de la Provinca Deputataro. Maldekstre sidas D-ro Zamenhof kun la orga-

nizintoj de la festo. Meze estas le neokupita trono, kun ambaŭflanke municipalaj rajdistoj.

La Urbestro *en Esperanto* malfermas la feston kaj donas la parolon al S-ro Bourlet.

S-ro Bourlet en elokventa parolado salutas la tieajn eminentulojn kaj dankas por la afabla pruntedono de la borsa ĉambrego kun la tuta materialo de la katalunaj Floraj Ludoj. Li montras, ke Esperanto estas vere natura lingvo, kiu havas siajn prozistojn kaj poetojn, kaj ĝin komparas kun sovaĝa rozo, kiu tamen restas *natura*, kiam genia ĝardenisto ĝin kulturas kaj aliformigas.

Poste D-ro Artigues, sekretario, transdonas al Rektoro Boirac la koverton, en kiu troviĝas la nomo de la venkinto en la konkurso « Poezio pri Amo ».

Rektoro Boirac gravmiene surmetas sian binoklon, malfermas la koverton kaj anoncas, ke la venkinto estas venkinto, nome S-rino Marie Hankel.

Oni longe aplaŭdas kaj aklamas la nomon de la Reĝino, dum ĉiuj eminentuloj eliras por ŝin alkonduki. Procesie ili revenas kun S-rino Hankel, kiu sidigas sur la tronon, dum ne ĉesas la varma aplaŭdado.

S-ro Chavet tiam legas la premiitan poemon de la Reĝino :

## LA SIMBOLO DE L'AMO

*Rozujo sovaga, simbolo de l'amo,  
En vintro vi staras sen ia ornamo !  
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,  
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.*

*Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas :  
« Silentu, silentu, mi dormon bezonas,  
« Min nutras denove patrino la tero,  
« Pacience atendas mi ĝis la somero.*

*Dormantan rozujon printempo vekigis,  
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.  
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,  
Girlandon balancan kaj brilekoloran !*

« *Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian,*  
 « *Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,*  
 « *Pro amo mi miajn floretojn defendos,*  
 « *Pro amo mi miajn pikilojn forsendos.*

*Al vento ĝi florfoliojn oferis,*  
*Aŭtune la fruktoj fiere aperis :*  
*Rozujo, simbolo de l'amo vi restas,*  
*Pacienca, alloga, kuraĝa vi estas.*

S-ro Grabowski poste raportas pri la poeziaj konkursoj kaj pri la rolo de poezio en disvolvigado de lingvo. La unuan fojon, li diras, la Esperantista Cindrulino, — la de multaj malŝatata kaj forpuŝata poezio, — estas invitita al kongresa festo. Malŝaton tamen ĝi ne meritas, kiel montris nia Majstro mem, aldonante kelkajn poemetojn al sia unua lernolibreto pri Esperanto. En la antaŭparolo de la *Liro de la Esperantistoj* la parolanto antaŭ 16 jaroj atentigis, ke ĉiam la apero de grandaj poetoj signas la plej grandan perfektigon de la lingvoj kaj al ili aldonas ĝis tiam nekonatan ĉarmon. Esperanto devas taŭgi por ĉiuj celoj, sekve ankaŭ por poezio, kvankam ĝia simpleco kaj reguleco malfaciligas la diversecon de formoj necesan por la belo. Ĝuste en la venkado de tiu malfacileco konsistas majstreco, kaj en tiu rilato oni devas esti kontenta pri la hodiaŭa poezia rikolto.

D-ro Artigues legas la saluton-raporton de D-ro Bein, pri la prozaj konkursoj. Bedaŭrinde ja ne povis veni en Barcelonon nia eminenta samideano, « katenita en Varsovio de malfavora sorto ». Li poste legas la longan nomaron de la premiitoj.

La duan premion de la konkurso pri Amo meritis S-ro Privat. Varma aplaŭdado salutas lian nomon kaj la legadon de lia poemo.

Ĉiuj premiitoj poste suriras laŭvice la estradon, kaj el la manoj de la Reĝino ricevas sian premion. Inter la plej ofte nomitaj estas S-roj Hermann Boucon kaj Clarence Bicknell, kiu tre kavalire genufleksas antaŭ la Reĝino, ĉiufoje kiam li ricevas de ŝi premion.

Ni ankaŭ aparte citu la nomon de la venkinto en la konkurso de D-ro Zamenhof « Regno de Homej » : nia bone konata, malnova kaj modesta samideano Paul de Lengyel,

aŭtoro de bonegaj verkoj *Libro de l' Humoraĵo, Mallumaĵoj*, k. a. Eĉ sen tiu sukceso, ni jam de longe konis lian talenton kaj bonegan posedon de nia lingvo. Ĉu li ne perfekte taŭgus por okupi en la Akademio la ĝis nun ne ankoraŭ okupitan « hungaran seĝon »? Tia estas almenaŭ *nia* sincera opinio.

Post kiam ĉiuj premiitoj ricevis siajn premiojn, S-ro Bourlet denove ekparolas. Li dankas la ĉeestintojn kaj esprimas la esperon, ke tiu ĉi festo estu la unua de longa vico.

Fine la Urbestro eldiras ankoraŭ en Esperanto la lastajn vortojn: « La Festo estas finita! ».

Kvankam ne multe pli interesa *per si mem*, ol ĉia disdonado de premioj en lernejoj kaj liceoj, tiu ĉi festo estis tamen *tre grava* por Esperanto en Barcelono. En ĝi ja Esperanto estis tute same akceptita kiel la kataluna lingvo, kaj tute sama estis la ceremonio por la Esperantaj Floraj Ludoj, kiel por la Katalunaj. Tiel nia lingvo kvazaŭ oficiale enviciĝis inter naciajn lingvojn. Sed ĉu la efekto estos sama en aliaj landoj, kie ne okazas naciaj floraj ludoj? Al kelkaj tio ĉi eble ŝajnos dubinda. Ĉiuokaze, se la Floraj Ludoj definitive fariĝos konstanta *oficiala* festo de niaj Kongresoj, ili ne devas resti kvazaŭ reklamilo por iu *aparta* gazeto. Al la konstanta Komitato de l' Kongresoj kaj al la *Oficiala Gazeto* apartenas ilia organizado.

Vespere okazis en la Barcelona Ateneo tre interesa parolado de S-ro Luis Carlos, preslaboristo kaj sekretario-fondinto de la *Internacia Ligo de la Esperantista Preslaboristaro*. Ĉeestis D-ro Zamenhof, esperantistaj eminentuloj kaj multaj preslaboristoj. Granda estis la sukceso de la parolinto. Aliparte estis en la *Gran Teatro del Bosque* prezentado de *Lohengrin*, la grandioza opero de Wagner, en honoro de D-ro Zamenhof kaj de la Kvina Kongreso. La rakonto de l' kavaliro Gral en la kvara akto estis kantita *en Esperanto*. Oni ankaŭ kantis « La Akcepton » de S-ro Pujula kun muziko de S-ro D. Juan B. Lambert, kaj fine estis baletto, kun alegoria prezento de Esperanto.

\* \* \*

Jaŭdon, 9. Septembro, je la 9-a matene, kunsido de la Lingva Komitato en la Universitato.

Je la 10-a, ĝenerala kunveno en la Universitato.

Tiu ĉi tuta kunsido estis okupita preskaŭ nur de varma, eĉ ofte elokventa diskutado pri la mistera, ĝis tiam tute sekreta projekto de « reprezentantaro ». La komenca propono de S-ro René Beck pri la esperanta gazetaro estis ja kvazaŭ nur enkonduko al tiu diskutado.

Post privata kunveno de la naciaj delegitoj, malfermiĝas la ĝenerala kunsido.

S-ro Chavet legas la protokolon de la antaŭa kunsido. Ĝi estas unuanime aprokata. Li poste legas nove ricevitaĵojn telegramojn: de la reĝo (estis *du* telegramoj de la reĝo: la unua estis *propramove* sendita; la dua estis respondo al la saluto de l' Kongreso), de la ministraro; de la ministroj de Internaj Aferoj, Milito, Publika Instruado, Justeco kaj Kultoj; de D-ro Kroĉta, el Japanujo; de la Amerika Asocio kaj de diversaj aliaj societoj kaj privataj esperantistoj. S-ro Chavet fine anoncas la solenan kunsidon de la Scienca Asocio, kiu okazos morgaŭ.

S-ro Pujula, prezidanto, donas la parolon al S-ro René Beck.

S-ro René Beck parolas pri la esperanta gazetaro. Li diras, ke preskaŭ ĉiumonate aperas novaj gazetoj, dum aliaj malaperas. Li citas la bedaŭrindan malaperon de *Tra la Mondo*, *Espero Pacifista*, *Bela Mondo*, kaj aludas la malgrandan nombron de la abonantoj de la *Oficiala Gazeto*. S-ro J. Borel jam bonege skribis pri tiu temo en *Germana Esperantisto*. S-ro Beck tute aprobas liajn konsilojn; oni devas krei novan gazeton, nur kiam ĝi estas *nepre necesa*. Li fine diras, ke estas la devo de ĉiuj esperantistoj aboni kiel eble plej multe da gazetoj.

S-ro Chavet opinias, ke la propono de S-ro René Beck dependas de io pli ĝenerala, nome de la subtenado de niaj institucioj, kiuj estas la bazo de nia propagando. Devas esti ia ligo, por ke ĉiu esperantisto sin sentu morale devigita al tiu ĉi subtenado. Tion oni jam proponis en Boulogne, sed la demando estis prokrastita. De la Boulogne'a Kongreso oni faris multajn proponojn kaj la afero ŝajnas nun matura. Tiun maturecon montras diversaj simptomoj: multaj grupoj sendas rajtigojn, kiuj efektive estas senutilaj; oni ankaŭ sendas proponojn pri ĝeneralaj organizoj. Tiajn proponojn sendis la grupo en Toulon (pri internacia loterio), la grupo en Le Creusot, S-ro Uhlmann, la grupo en Leitmeritz, S-ro Hoa,



la Esperanta Asocio de Norda Ameriko. la centra reprezentantaro estus do utila por internaciaj entreprenoj. Pri tia reprezentantaro la Konstanta Komitato redaktis projekton, kiu tute flanke lasas la lingvajn demandojn, (dependantajn de la Lingva Komitato kaj de la Akademio) kaj la propagandon en apartaj landoj, (apartenantan al la naciaj societoj). Oni devus unue starigi ĝustan liston de la diverslandaj esperantistaj grupoj, kaj por tio estas necese, ke ĉiu societo aŭ grupo sendu al la Centra Oficejo sian regularon aŭ almenaŭ difinon de sia celo. — La projekto ne celas doni estrojn al la esperantaj societoj, ĝi kontraŭe celas, ke la societoj estu mem la ĉefoj. S-ro Chavet fine legas la tekston de tiu projekto, antaŭe komunikitan al la kongresa estraro kaj al la naciaj delegitoj en la kunveno ĵus okazinta antaŭ la ĝenerala kunsido.

Jen estas la teksto de la proponita projekto :

*La Kongreso esprimas la deziron, ke*

*I. — Estu fondita, aparte de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, administra reprezentantaro de la propagandaj societoj, por oficiale reprezenti la Esperantistojn en ĝeneralaj okazoj kaj zorgi pri la funkciado de la oficialaj Institucioj de Esperanto ;*

*II. — Tiu reprezentantaro estu elektita de la diversnaciaj propagandaj Societoj de Esperanto proporcie je ilia multnombreco, po unu delegito por mil Esperantistoj, laŭ metodo difinota de la unua reprezentantaro ;*

*III. — La unua tasko de tiu reprezentantaro estu starigi specialan regularon, por finance subteni la oficialajn Instituciojn de Esperanto ;*

*IV. — La unua reprezentantaro estu elektita laŭ provizora regularo, difinita de la Konstanta Komitato de la Kongresoj.*

S-ro Bobin (franco) petas parolon pri la projekto. Ŝajnas al li necese, antaŭ ĉia diskuto de la propono, fari la jenan rimarkon : tiu grava, tre grava propono, estis anoncita nur antaŭ tri tagoj, de kiam la kongresanoj alvenis Barcelonon ; kaj, kompreneble, iliaj ĉiutagaj devoj kaj okupoj malobligis, ke ili povu ĝin pripensi trankvile kaj vigle, ĝis lasta fundo. Eble oni povos hodiaŭ interŝanĝi pri tiu temo kelkajn

rapidajn impresojn, sed estas tute ne eble, ke la diskutado estu kompleta kaj dokumentita, kaj ke ĝi povu finiĝi per esprimo de preciza deziro. — Antaŭ kvar jaroj, en la Boulogne'a Kongreso, kie ĉeestis la parolanto, oni jam faris proponon samspecan kiel tiu ĉi, kaj tiun proponon la kongresanoj preskaŭ unuanime forjetis, kvankam ĝi estis farita de nia Majstro mem kaj apogita per lia grandega aŭtoritato. — Kial oni forjetis la proponon? Ĉar oni povis dum kelkaj monatoj antaŭ la Kongreso studi ĝin tre zorge, diskuti ĝin en konversacioj kaj jurnaloj. Tiamaniere oni akiris la konvinkon, ke tiu propono estas maltaŭga por la bono de Esperanto. — Oni memoru ankaŭ, ke, en la unua ĝenerala kunveno de la Ĝeneva Kongreso, kvankam la propono estis definitive forigita en Boulogne, la estraro tamen demandis, ĉu oni devas ĝin meti denove en la tagordon; kaj duan definitivan fojon la Kongreso ĝin forpelis. Sed vere tiu propono ŝajnas havi fortikegan vivon. Malgraŭ ĉia definitiveco ĝi reaperas hodiaŭ sub alia formo, kaj ĝi reaperas tute diskrete, senbrue, kiel afero negrava, senkonsekvenco. — Tamen ĝi povas esti tre danĝera por Esperanto. Kio povos okazi kun tiu propono, jen ĝi estas en kelkaj vortoj: Oni volas doni al ni rajtigitan reprezentantaron. Sed jam tian organon ni posedas, kiu liveras multvalorajn garantiojn, ne liverotajn de alia: ĝi estas la Akademio kaj la Lingva Komitato. La parolanto ja scias, ke la nova rajtigitaro devus esti, almenaŭ principe, tute ne lingva; sed oni povas timi, eĉ *timegi*, ke ĝi profitus deziron, eĉ malprecizan de nia Kongreso por preni la lokon de la Akademio kaj arogi al si ĝian povon. Tion sendube esperas kaj atendas la ne ankoraŭ finmortinta Delegacio por alprenado de lingvo internacia. Nian Akademion ĝi ne ŝatas pro ĝia fideleco al la Zamenhofa lingvo. Sed, se ni starigos alian organon ŝajne ne lingvan, ĉar ĝi ne konsistos el lingvistoj, la Delegacio rapidos repreni kun ĝi, super la Akademio, la rompitan traktadon; kaj des pli fervore, ke ĝi scios, ke antaŭ ĝi nur estas homoj ne kompetentaj en la lingva fako. Kaj ni ne povas scii nun, kia estus tiu reprezentantaro, ĉu fidela, ĉu ne. — Resume, oni ne devas rapidi solvi malserioze la hodiaŭan demandon. Ĝiaj aŭtoroj mem, si ili konsideras ĝin kiel tute atentindan kaj gravan, eble konsentos kun la parolanto, por ne forrabi baloton kvazaŭ surprize. Kiel antaŭ kvar jaroj, oni prenu la necesan tempon,

por ĝin studi ĝisfunde, kaj oni prokrastu ĝin ĝis la venonta jaro, por pli plena enketo. Ĉu la kongresanoj volas resti fidelaj? Jes! Do, ili havas fidelan rajtigitaron; ili konservu ĝin. Ili pripensu longatempe, eĉ unu tutan jaron, antaŭ ol aldoni al sia bona kaj vigla ĉevalo alian unuokulan, aŭ eĉ tute blindan!

S-ro Douglas (skoto) petas, ke oni ne tuj faru decidon pri tiel grava propono. Oni sendu ĝian presitan tekston al la Esperantaj Societoj kaj prokrastu decidon ĝis la venonta Kongreso.

S-ro Boirac plene aprobas la proponon. Li tute fidas al la fideleco de la naciaj societoj kaj grupoj. Li ne opinias, ke la proponata reprezentantaro povos kontraŭstari al la Akademio kaj al la Lingva Komitato. Cetere, oni jam riproĉis, ke la Lingva Komitato ne estas rajtigita. La Akademio kaj la Lingva Komitato bezonas monon, kaj ĝis nun mono venis nur private de malavaraj amikoj. Tio ne povas daŭri. La esperantistoj mem devas doni monon. Sed kiu difinos kaj kontrolos la monkolekton. Speciala organo estas tute necesa por tiu ofico, kaj tial la parolanto estas tute favora al la prezentita propono.

S-ro Blaise kontraŭbatalas la projekton. Reprezentantaro estas tute senutila, kaj transpasante sian oficon, ĝi eĉ povus fariĝi tre danĝera. Simile, la Delegacio estis fuŝa afero, ĉar ĝi estis fondita por elekti lingvon, kaj ĝi volis reformi. Oni povas sin turni rekte al la naciaj Societoj. — Ĉar multaj personoj ne estas membroj de societoj, la projektita reprezentantaro tute ne reprezentus la tutan Esperantistaron. Li proponas referendumon.

S-ro Chavet diras, ke oni ne volas doni estrojn al la esperantistoj. La situacio estas tute alia. Oni ne parolis nur pri grandaj societoj; la malgrandaj povus ankaŭ esti reprezentataj. Lingvo internacia ne estas kiel naciaj lingvoj; ĝi bezonas societojn. — Generalo Sebert vizitis francajn ministrojn por Esperanto, sed malsukcesis, ĉar oni demandis lin, en kies nomo li parolas.

S-ro Pujula raportas, ke kiam li volis malfermi konton je la nomo de la Kongreso aŭ de ĝia kasisto, oni demandis lin, de kiu li estas rajtigita.

S-ro Mann (brito) opinias, ke malgraŭ la « klarigo » farita de S-ro Chavet, la diskuto ankoraŭ ne estas « klara ».

Oni konfuzas diversajn aferojn. Oni parolas jen pri Centra Oficejo, jen pri propagando, jen pri Lingva Komitato. Oni devas klare difini la rolojn de la Centra Oficejo kaj de la Lingva Komitato. La Centra Oficejo devus esti nur *archivejo*, statistikejo, bibliografiejo, k. t. p. Pri la *propagando* la naciaj societoj jam bone zorgas. Oni ne bezonas specialan centran organizaĵon, por reprezenti la Esperantistaron en rilatoj kun la registaroj, ekzemple pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Tion povas plej efike fari la naciaj Societoj. Se, kiel diris S-ro Boirac, la naciaj societoj estas fidindaj, kial oni ne fidus ilin, elmetante al ilia konsiderado la proponatan organizaĵon? — Oni klare difinu la rolon de la Centra Oficejo kaj de la Lingva Komitato, kaj oni facile trovos por ili subtenon ĉe la nacie ligitaj grupoj kaj societoj. Oni ne ligu sin por dek jaroj per facilanima decido nuna. — La parolanto proponas, ke oni elmetu la ideon dum unu jaro al la konsiderado de la grupoj kaj rediskutu la aferon en la proksima Kongreso.

S-ro Mybs diras, ke la germanoj nur apogas la proponon.

S-ro Decourt (franco) diras, ke oni fondis la Lingvan Komitaton kaj la Organizan Komitaton, sed ne donis al ili monrimedojn. Por tio ne sufiĉas naciaj societoj.

S-ro Mahn (germano) aprobas la proponon kaj opinias, ke ni bezonas konstitucion.

S-ro Boirac, kiel privata kongresano, rimarkigas, ke la Kongreso ne havas la rajton decidi; ĝi povas nur esprimi deziron al la naciaj societoj, kiuj decidis mem. Oni konsentas pri la mona flanko, sed delegitoj estus ankaŭ utilaj por propagando.

S-ro Duviard (franco) diras, ke li estas nur infano, sed ĝis nun oni parolis nur infanaĵojn. La prezidanto de la Lingva Komitato kaj la sekretario de la Centra Oficejo ja pli bone konas siajn aferojn ol la parolintoj (*Bruo*). Kiel juna esperantisto kaj reprezentanto de la esperantistoj de la estonteco (*sic*), li aprobas la projekton.

S-ro Chavet opinias, ke la starigo de reprezentantaro estas ankaŭ necesa por fari ĝustajn statistikojn kaj por sendi al la Amerika Kongreso oficiale rajtigatajn delegitojn.

S-ro Privat diras, ke oni ne malfidas al tiuj, kiujn oni kritikis. Kaj efektive ni tre fidas kaj dankas al la maljuna sed vigla homo, kiu ĝis nun private subtenis niajn Instituciojn.

Ankaŭ al la naciaj societoj ni tute ne malfidas. Sed certe la deziro de D-ro Zamenhof kaj la tuta Kongreso estas, ke oni bone akordiĝu. Ne bone estus do fari decidon pri tiel grava demando nur per malgranda plimulto. Ĉiuj konsentas pri la financa flanko; *sed kial oni kaŝas sub tio ion alian?* Pri ĉio cetera oni havos tempon por pripensi; nun oni starigu nur ian konsilantaron, kiu zorgos *eksklusive* nur pri financa subteno de niaj Institucioj. S-ro Boirac certe ne povis paroli en nomo de ĉiuj Lingvakomitatoj. Ankaŭ oni ne povus sin prezenti en nomo de ĉiuj societoj, se iuj voĉdonus kontraŭe.... Vivu D-ro Zamenhof kaj vivu interkonsento! (*Longa aplaŭdado*).

S-ro Chavet: Se la aplaŭdoj al S-ro Privat montras aprobon, la demando estas nun preskaŭ nur pri financa afero.

S-ro Privat: Ne «preskaŭ», sed *eksklusive nur* financa!

S-ro Cart, salutata per longa aplaŭdado, rimarkigas, ke en ĉiu parolado estas du partoj: la ĝenerala kaj la praktika. Nu, praktike, ni bezonas monon, kaj la *monan* demandon ni ne devas prokrasti, sed tuj solvi. Sed por oportune diskuti, estas nepre necese havi presitan tekston. Poste oni povos aparte esplori ĉiun paragrafon.

S-ro Chavet diras, ke oni presigos tekston, kaj ke ĉiu persono povos veni en proksiman kunsidon kun tiu esplorota teksto en la mano. Li poste faras diversajn anoncojn, kaj tiu tre interesa kunsido finiĝas tiel malfrue, ke ne povas okazi kunsido de la Lingva Komitato, difinita de la programo por la 12-a.

\*  
\* \* \*

Posttagmeze, je la tria, estis ekskurso al la Monto Tibidabo. Per specialaj tramveturiloj kaj per ŝnurvagonaro la kongresanoj suprenveturis tiun monton, altan 532 metrojn, apud Barcelono. Sur la supro ili ĝuis tre belan vidon super la urbo kaj la maro. Ankaŭ estis tie tre kuriozaj katalunaj dancoj kun tute originala muziko. Kiam en belega ruĝo la suno subiris la montan horizonton, la ekskursantoj kun bedaŭro forlasis tiun belan lokon kaj rapidis reveturi malsupren al la urbo, ĉar vespere estis en la teatro *Romea* prezentado de *Mistero de Doloro*.

Tiu ĉi prezentado bonege sukcesis, kvankam neeviteble sin trudis al la spirito de ĉiuj ĉeestantoj komparo kun la

mireginda *Ifigenio* de la pasinta jaro: Gual ne estas Goethe, Pujula ne estas Zamenhof, la teatro *Romeo* ne estas la Dresdena operejo. Tamen, kvankam ne estis egalita la nesuperbla mirindaĵo de la Kvara Kongreso, la kongresanoj pasigis tre agrablan vesperon. La tuta teatro estis ornamita per flagoj kaj floraj girlandoj; plenega ĝi estis, kiam eniris D-ro Zamenhof, akceptata per aplaŭdoj kaj aklamoj de longa ovacio, kiu finiĝis per kanto de « La Espero ». S-ro Bourlet unue legis paroladon de S-ro Gual <sup>(1)</sup> kaj poste komenciĝis la teatraĵo. Tre bona estis la ludado de la aktoroj, kaj ankaŭ bonega ilia elparolado. Bedaŭrinde nur estis, ke oni lasis en la teksto la multajn erarojn pri uzado de la formo kun *e* de l' participo. Facile tamen estis korekti tiujn erarojn por la ludado. En la mirinde bona elparolado de la aktoroj ankaŭ estis rimarkeble, ke « Mariano » konstante akcentis la unuan el du sinsekvantaj unusilabaj vortoj. Ekzemple: « mi diras al vi... », kvazaŭ la vortoj estus: « mi diras alvi ». Post la lasta akto la aktoroj estis multfoje revokitaj per longa aplaŭdado, al ili oni jetis florojn, ŝiritajn el la ornamitaj balustradoj de l' teatro. La aŭtoron kaj la tradukinton, vokitajn sur la scenejon oni ankaŭ varme aklamis. Fine la aktoroj vizitis D-ron Zamenhof en lian loĝion, kie ili ricevis liajn gratulojn kaj dankojn; kaj per kanto de « La Espero » finiĝis, kiel komenciĝis, tiu bela vespero.

\*

\* \* \*

Vendredon, 10. Septembro, matene, je la 9-a, kunsido de la Lingva Komitato en la Universitato.

Je la 10-a, solena kunveno de la Internacia Scienca Asocio.

Generalo Sebert prezidas. S-ro Renard raportas pri la financa situacio de la Asocio. S-ro de Saussure poste legas tre aplaŭdatan raporton, en kiu li resumas la historion de la Scienca Asocio kaj klarigas ĝian laboron pri teĥnikaj vortaroj. Estis kreitaj *Akademia Komisio*, kiu ekzamenas la jam uzitajn sciencajn vortojn kaj elektas la plej bonajn por oficialigo, kaj *Tehnika Komisio*, kiu proponas novajn vortojn kaj donas konsilojn al la ellaborantoj de teĥnikaj vortaroj. <sup>(2)</sup>

(1) En la aldono oni trovos la plenan tekston de tiu interesa parolado.

(2) Vidu en la aldono la plenan tekston de tiu grava raporto.

Generalo Sebert esprimas al la S-ro de Saussure la plej korajn dankojn de la Asocio por lia sindona laborado kaj granda malavareco.

Fine oni elektas la novan komitaton de la Asocio. Prezidanto por la venonta jaro estas Prof. Ed. Huntington, el la Harvarda Universitato (Usono).

\*

\*   \*

Posttagmeze okazis en la Parko bicikletkurado, por gajno de « Pokalo Esperanto ».

Vespere, je la 10-a, estis Internacia Balo en la Palaco de la Belartoj. Ĝi estis pli vere prezentado de naciaj dancoj, ol efektiva internacia « balo ». El la grandega halo de la palaco de la Belartoj estis difinita por dancado nur malgranda kvadrato kun tapiŝo inter triobla vico da seĝoj. Tie, sur la tapiŝo, ne tre glitiga por dancado, sin pene interpuŝis la paroj dum kelkaj dancoj. Malmultaj estis la naciaj kostumoj, eble ĉar ĉiujare pli kaj pli perdiĝas la bonega elpenŝajo de la Boulogne'a Kongreso ; pli kaj pli multiĝas fantaziaj kostumoj: S-ro Chavet, ekzemple, pura Parizano, surportis... katalunan kostumon. La plej grava parto de la tiel nomita balo estis dediĉita al prezentado de katalunaj dancoj sur aparta estrado. Efektive tre interesaj ili estis, kaj tre pitoreskaj la kostumoj de la dancantoj, sed multaj kongresanoj, venintaj por danci *mem*, eble ne tiom ŝatis tiun iom longan prezentadon, kiom ĝi sendube meritis.

Dum la balo oni sciigis, ke morgaŭ matene, je la deka, okazos en la Universitato ĝenerala kunsido, ne anoncita en la programo.

\*

\*   \*

Sabaton, 11. Septembro, je la 10-a matene, ĝenerala kunsido en la Universitato.

S-ro Pujula, prezidanto, malfermas la kunsidon.

S-ro Chavet diras, ke la protokolo de la antaŭa kunsido ne estas ankoraŭ preparita. Oni prokrastos ĝian legadon ĝis la kunsido, kiu okazos posttagmeze, je la tria. Ĝis tiu kunsido oni prokrastos ankaŭ la daŭrigon de la diskutado pri la « reprezentantaro ». En la nuna kunsido S-ro Boirac raportos pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio.

Oni pritraktos la demandon pri la loko de la venontaj kongresoj, kaj, se restos tempo, kelkajn aliajn pli malpli gravajn demandojn.

S-ro Pujula legas diversajn telegramojn kaj sciigas, ke la unua telegramo de la reĝo ne venis kiel respondo, sed estis *propramova* saluto al la kongreso.

S-ro Boirac havas la parolon. Li diras, ke la Direktoroj de la Akademiaj sekcioj jam prezentis al la Lingva Komitato raportojn, kiuj estis de ĝi aprobitaj. Ĉu oni povas paroli pri agado de la Lingva Komitato kaj de la Akademio? Multaj plendas, ke ili nenion faras. Eble tiuj plendantoj dezirus, ke oni ilin persone sciigu pri la efektivigitaj laboroj, aŭ ke oni ĉion tuj solvu en unu tago. Ili similas malsaĝajn ĝardenistojn, kiuj tro frue volas fruktojn. Ni havas por ni la estontecon: Esperanto ja estas de nun eterna. Ni do laboru saĝe, serioze, elspezante la necesan tempon. Tio ĉi tamen ne signifas, ke ni devas atendi senfine. Dum la pasinta jaro la Akademio kaj la Lingva Komitato efektive plenumis gravan laboradon. Pri ĝi S-ro Boirac resumas la raportojn prezentitajn de la Direktoroj de la Akademiaj Komisioj dum la dua kunsido de la Lingva Komitato. Li ankaŭ raportas pri la kunsidoj de la Lingva Komitato okazintaj dum tiu ĉi kongreso. Finante, li diras, ke antaŭ kvin jaroj, antaŭ la Boulogne'a Kongreso, li en Barcelono partoprenis en malgranda esperantista kongreseto. De tiu tempo grandega paŝo estas efektivigita, kaj tiu kontrasto plifortigas nian esperon kaj nian fidon. Li petas, ke kun li la kongresanoj krii: Vivu Barcelono! Vivu Zamenhof! Vivu por ĉiam Esperanto!

Generalo Sebert, tre aplaŭdita, parolas pri la loko de la venontaj kongresoj. En Dreseno oni komisiis la Organizan Komitaton, ke ĝi organizu du kongresojn: unu en Barcelono kaj la alian en Usono. Post longa korespondado, oni konvinkigis, ke neeble estas organizi du kongresojn, kaj oni decidis fari la Kvinan Kongreson en Barcelono kaj la Sesan en Usono. Oni devis ankaŭ interkonsenti kun la belgaj esperantistoj, al kiuj estis promesite, ke la Kongreso de 1910 okazos en Antverpeno. Ili bonvolis akcepti, ke la Antverpena Kongreso okazos nur en 1911. Do, la Kongreso de 1910 devas okazi en Usono, kaj tiu de 1911 en Antverpeno. Nur pri Kongresoj de sekvontaj jaroj oni povas nun diskuti. — Laŭ la regularo de la Organiza Komitato, nun ne plu



estas membroj en ĝi S-roj Pollen kaj Mudie, de la Tria Kongreso. Por la Sepa, Generalo Sebert proponas S-rojn Van der Biest kaj Van Schoor (*Aproba aplaŭdado*). — La parolanto fine sciigas, ke la Amerika Asocio proponis, ke la Sesa Kongreso ne okazu en Chautauqua, sed en Washington.

S-ro Reed, en nomo de la Nord-Amerika Asocio kaj de la Komerca Ĉambro de Washington, invitas la Sesan Kongreson en tiu ĉi urbon. Se estos eble oni aranĝos specialan ŝipon por la Eŭropaj kongresanoj aŭ almenaŭ specialan fakon.

S-ro Van der Biest invitas la Sepan Kongreson en Antverpenon, kie estas multaj esperantistoj kaj granda fervoro por Esperanto.

S-ro Mudie esprimas sian malĝojon, ĉar li devas ekŝigi el la Organiza Komitato, sed tiu ĉi malĝojo estas kompensata de la ĝojo vidi nun en la Komitato pli junajn kaj energiajn membrojn el Ameriko. Li legas leteron de Kolonelo Pollen, kiu certigas, ke la Kongreso nepre sukcesos en Ameriko.

S-ro Chavet sciigas, ke jam oni ricevis invitojn por la Kongresoj de la venontaj jaroj el München, Praha, Graz, Wien kaj Krakau.

S-ro Krudnicki petas, ke la oka Kongreso okazu en Krakau, en la naskiĝa lando de Esperanto.

S-ro Chavet anoncas, ke la solena ferma kunveno okazos je la tria en la Palaco de la Belartoj. Tuj poste okazos kunveno de la Ruĝ-Krucanoj. Hodiaŭ, tuj post tiu ĉi kunsido, estos kunsido de junuloj.

S-ro Duviard parolas pri la propono de la franca deputato S-ro Cornet, por oficiala akcepto de Esperanto en Francujo. Tiu ĉi propono estis resendita al la Komisio de Instruado. Ĉiuj francaj esperantistoj skribu al ĝia prezidanto, S-ro Buisson, kaj sendu la leterojn al la parolanta junulo, kiu ilin transdonos.

S-ro Chavet atentigas la sekretariojn de specialistaj kunsidoj, ke ili ne forgesu sendi kiel eble plej frue la protokolojn de tiuj kunsidoj.

S-ro Mudie proponas, ke la Kongreso 1-e esprimu la deziron, ke la granda Brita Biblia Asocio entreprenu la esperantan tradukon de la Biblio; 2-e rekomendu la uzon de metalaj afiŝoj sur la pordo de la esperantaj oficejoj; 3-e sendu saluton al du bedaŭrinde forestantaj moŝtuloj: S-roj Kabe kaj Pollen.

S-ro Berlant sciigas, ke la lasta Kongreso de Keramistoj akceptis Esperanton kaj esprimis la deziron, ke la naciaj federacioj de keramistoj ĝin propagandu.

S-ro Pujula demandas, ĉu oni aprobas la proponojn de S-ro Mudie. (*Aprobo*).

La kunsido finiĝas je la 12-a.

\*

\* \*

Je la tria posttagmeze, solena ferma kunsido en la palaco de la Belartoj.

S-ro Pujula, prezidanto, malfermas la kunsidon.

S-ro Chavet legas la protokolon de la dua ĝenerala kunsido kaj poste la novan tekston proponatan pri financa konsilantaro, kiu estis disdonita al la kongresanoj dum la prezentado de *Mistero de Doloro* kaj afiŝita en la Universitato.

Jen estas tiu ĉi nova teksto :

*La Kvina Kongreso de Esperanto esprimas la deziron, ke la diverslandaj societoj por la propagando de Esperanto kreu per proporcia balotado Internacian Konsilantaron, por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj. (Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj).*

*En tiun konsilantaron oni elektos unu anon po mil anoj de propagandaj societoj.*

S-ro Cart plene aprobas la novan tekston kaj esperas, ke oni ĝin akceptos unuanime, por montri la pacan senton, kiu inspiras la Kongreson. Li atentigas pri gramatika erareto en la teksto : anstataŭ *unu anon po mil anoj*, devus esti *po unu ano por mil anoj*. Li fine dankas S-ron Chavet por lia protokolo, tiel bone redaktita, ke neniu havis ion por riproĉi.

S-ro Chavet diras, ke la eraro montrita de S-ro Cart estas nur preseraro. Oni devas legi *unu anon por mil anoj*.

S-ro Mudie en nomo de la Angloj estas tute kontenta pri la nova teksto. La Angloj estas tre dankaj al la mal-avaraj homoj, kiuj ĝis nun private helpis al nia afero; ili estas ankaŭ tute pretaj provizi financan helpon laŭ la bezono.

S-ro Marich aprobas la proponon en nomo de hungaroj.

La Kongreso aprobas unuanime kaj sen rimarko la novan tekston (1).

S-ro Chavet diras, ke nun restas por trakti nur kelkaj malgravaj demandoj. Li atentigas, ke la forveturantaj kongresanoj devos enregistrigi siajn pakajojn ne por Port-Bou, sed por Cerbère, kvankam iliaj reiraj biletoj valoras nur ĝis Port-Bou. — Li poste sciigas, ke en hodiaŭa kunsido de Germanoj oni raportis, ke kelkaj gazetoj donis mulĝustan informon pri la nombro de la kongresanoj.

S-ino Pujula, sekretariino, diras, ke la nombro de la kongresanoj estas almenaŭ 1300.

D-ro Dor memorigas, ke Dunant, la fondinto de la Ruĝa-Kruco, ricevis Nobel'an premion de paco por sia klopodo forigi la malfacilaĵojn en flegado de militaj vunditoj. Mankas nun konfirmo de la klopodoj de D-ro Zamenhof, kies genia elpenaĵo efektive donos pacon al la homaro, forigante la militojn. Oni jam klopodis, por ke li ricevu Nobel'an premion de paco, sed se la Kongreso akceptos unuanime proponon en tiu direkto, tio ĉi estos grava antaŭenpuŝo por atingi la celon.

D-ro Zamenhof tre dankas por la propono de D-ro Dor, sed petas, ke oni ne enskribu ĝin en la protokolon, ĉar tio ne apartenas al la Kongreso, sed estas nur privata propono.

S-ro Mudie demandas, ĉu D-ro Zamenhof opinias, ke la Kongreso ne rajtas tion proponi, aŭ ĉu li nur private petas, ke ĝi tion ne faru.

D-ro Zamenhof respondas, ke, kompreneble, la Kongreso rajtas prezenti tiun proponon, sed li private preferas, ke ĝi ne prezentu ĝin.

S-ro Keating dankas por la afabla akcepto de la katalunoj. Li diras, ke Brazilujo estas kaj restos ĉiam fidela al

---

(1) Oni tamen povus rimarki, ke en la nova teksto ne estas la vorto « nur financa », pri kiu forte insistis S-ro Privat dum la diskutado, dum kontraŭe en ĝi estas la *proporcieco*, apartenanta al la unua propono kaj tute ne necesa por nur financa konsilantaro, — ne « reprezentanta ». Ĉu per tio oni volas malgraŭ ĉio atingi la unuan celon, ŝanĝante poste en « reprezentantaron » la nune akceptitan *financan* « konsilantaron », kiu tiel nur estus kvazaŭ unua ŝtupo al ĝi? La estonteco tion montros. Sed tion oni rajtas antaŭsuspekti post la mistera preparado kaj subita prezento de la ne akceptita propono pri reprezentantaro.

la Fundamento. Li sciigas, ke la Kvara Kongreso latin-amerika de kuracistoj decidis konsili la uzadon de Esperanto en verkoj por internaciaj celoj. Fine li diras, ke tre feliciaj estus la Braziloj, sed ili iam povus akcepti la Kongreson en sian belan landon.

S-ro de Saussure raportas pri la kunsidoj de la Scienca Asocio, en kiuj oni atingis definitivajn konkludojn pri la ellaborado de tehnikaj vortaroj. Li esperas, ke la unua eldono de la tehnikaj vortaro povos aperi antaŭ la venonta Kongreso.

S-ro Allende proponas, ke la Kongreso petu la hispanan registaron, ke ĝi farigu kursojn pri Esperanto en la lernejoj, aŭ almenaŭ permesu ilin fari.

S-ro de Saussure sciigas, ke la nova prezidanto de la Scienca Asocio estas Profesoro Huntington de la Harvarda Universitato (Usono).

S-ro Bremon y Masgrau diras, ke la propono de S-ro Allende ŝajnas ne akceptebla. Ekzistas parlamento, kie oni devas studi la proponojn; kaj tiuj ĉi devas esti prezentitaj de deputatoj. Devus esti almenaŭ kelkaj landoj, por prezenti la proponon kune.

S-ro Allende respondas, ke li ne volas peti, ke oni prezentu la proponon rekte al la registaro, sed per la deputatoj de Katalunujo.

S-ro Pujula rimarkigas, ke, ĉar la propono ne estis antaŭe prezentita al la estraro, tial oni ne povas decidi pri ĝi.

S-ro Chavet legas telegramon de S-ro Evstifeieff, akademiano, kaj proponas la jenan tekston por la deziroj kaj decidoj de la Kongreso:

Pri la propagando: « La Kongreso dankas S-rojn Mann, Blaise, Mudie, Cart, Allende kaj Privat pri iliaj interesaj komunikoj pri la ĝenerala propangando. »

Pri insignoj: « La Kongreso atentis kun granda intereso pri la modeloj de insignoj, kiujn la Centra Komercejo por Esperantujo kaj S-ro Diemer prezentis al ĝi. »

Pri internacia restadejo: « La Kongreso sciigas kun granda plezuro pri la intenco de la grupo de Godesberg starigi konstantan centran restadejon por la esperantistoj. »

Pri la Lingva Komitato: « La Kongreso aŭdis kun granda intereso la raporton de S-ro Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio, kaj varme aprobas ĝiajn konkludojn. »

Pri la estontaj Kongresoj: « La Kongreso decidas, ke la Sesa Kongreso okazos en Washington, laŭ la propono de la Amerika Asocio, en 1910, kaj la Sepa en Antverpeno en 1911 laŭ la propono de la Belga Ligo. — Ĝi notas por la postaj jaroj la inviton de la urboj München, Graz, Praha, Wien kaj Krakau. »

Pri la Konstanta Komitato de la Kongresoj: « La Kongreso, laŭ la Kongresa Regularo, elektas kiel novajn anojn de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, komisiita por organizi la sekvontajn Kongresojn kaj plenumi la decidojn kaj dezirojn de tiu ĉi Kongreso, S-ron Van der Biest kaj S-ron Van Schoor, por la Sepa Kongreso. »

Pri traduko de la Biblio: « La Kongreso esprimas la deziron, ke la Brita Biblia Societo povu entrepreni la tujan eldonadon de la tuta Biblio en Esperanto. »

Pri metalaj afiŝoj por Societoj: « La Kongreso rekomendas al la propagandaj societoj la uzon de verdaj emajlitaj metalaj afiŝoj, por surmeti je la ekstera pordo de ĉiuj esperantaj entreprenoj. »

Pri la nombro de la Kongresanoj: « La Kongreso konstatas kun bedaŭro, ke kelkaj ĵurnaloj donis neĝustan malgrandan ciferon pri la nombro de la Kongresanoj, kaj ĝi sciigas kun granda plezuro, ke la nombro de la Kongresanoj estas pli ol 1300. »

Pri organizo: « La Kvina Kongreso de Esperanto esprimas la deziron, ke la diverslandaj societoj por la propagando de Esperanto kreu per proporcia balotado Internacian Konsilantaron, por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj. (Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj). — En tiun konsilantaron oni elektos unu anon por mil anoj de propagandaj societoj. »

Dankesprimoj: La Kongreso esprimas koran dankon al la Urba Gvardio, al la Loka Komitato kaj al ĉiuj aŭtoritatoj, kiuj helpis al ĝia sukceso.

Tiu ĉi teksto estas unuanime akceptata.

S-ro Pujula donas diversajn sciigojn kaj proponas, ke oni danku per aplaŭdoj la esperantistan Urban Gvardion de Barcelono.

S-ro Sabadell proponas koran aplaŭdon por la forestantoj.

S-ino Pujula esprimas la dankojn de la tuta Urba Gvardio en nomo de la sub-estro, staranta apud ŝi.

S-ro Chavet sciigas, ke tuj post la kunveno li komunikos al la gazetistoj la tekston de la decidoj kaj deziroj de la Kongreso. (Tiu ĉi teksto estas supre represita).

S-ro Pujula donas sciigojn pri invito de la Urbeŝtaro por honora vino, kiu estos proponata hodiaŭ vespere al la kongresanoj, en la granda halo de la palaco de la Belartoj, por ilin oficiale adiaŭi.

S-ro Bourlet petis la honoron diri la lastajn vortojn; ili estas vortoj de plena ĝojo kaj kontenteco por la atingita sukceso, tiom en la fakaj kunvenoj, en kiuj oni faris bonegan laboron (kvankam ili ne estis tiel multaj, kiel kutime), kiom en la ĝeneralaj kunsidoj, en kiuj oni akceptis tre gravan proponon. Por la belegaj festoj li ankaŭ plej kore dankas la Barcelonajn amikojn, kiuj tiel bone sukcesis ilin organizi malgraŭ grandaj ne antaŭviditaj malfacilaĵoj.

S-ro Pujula tre ĝojas respondi la afablajn vortojn de S-ro Bourlet je la nomo de ĉiuj liaj kamaradoj. Ne nur *ili* organizis kaj laboris, por ke la tuta movado estu fruktoporta. *Ĉiuj* laboris, propagandis kaj plenigis la ĵurnalojn per la nomo de Barcelono. La Esperantistoj venis en Barcelonon post batalado, por alporti la pacon. Ili ne estis en fremda lando, sed inter fratoj, inter membroj de sama familio. S-ro Pujula fine dankas la aŭtoritatojn, kiuj multe helpis al la Kongreso kaj adiaŭas al la kongresanoj. Vi forvojaĝos korpe, li diras, sed spirite vi restos ĉi tie. Ĉie diru, ke tie estas popolo, kiu amas vin, kiu batalas por la sukceso de la lingvo internacia, por paco kaj frateco. — Li poste transdonas la parolon al D-ro Zamenhof.

D-ro Zamenhof, antaŭ ol la kongresanoj disiros, volas diri ankoraŭ kelkajn vortojn. Li volus esprimi koran dankon al ĉiuj, kiuj laboris por la Kongreso kaj akceptis la kongresanojn. Tiun devon jam plenumis S-ro Bourlet. Ĉiuj forveturos el Barcelono kun la plej bona memoro pri la urbo kaj la tuta lando. — Ĉu la Kongreso ion donis, aŭ ne? Ŝajnas sur la papero, ke la akiroj estas malgrandaj. Eble

kelkaj mokos, ĉar ni ne faris ŝanĝojn, nek rompojn. Sed ĝuste pro tiu cirkonstanco, ke ni ne faris rompojn, ni eliris el la Kongreso fortikigitaj, sen ia skuado. Tio estas nia plej grava rezultato. S-ro Pujula rakontis, ke iu gazeto en Barcelono ĉiam atakadis Esperanton. Nun ĝi konfesis, ke ĝi estis malprava kaj mokis senkaŭze. Tio estas por ni tre grava afero kaj sendube ne estos la sola. Aliaj rezultatoj certe montriĝos poste. — Ni montris en la nuna Kongreso, ke ni estas tute maturaj. Timoj montriĝis senkaŭzaj pri divido pri grava demando. Oni vidis, kiel flue oni parolas nian lingvon. Aŭdante niajn diskutadojn, oni ne supozus, ke ĝi estas lingvo artefarita. Tio faris plej bonan impreson. *Nun ekzistas nenia dubo pri tio, ke nia lingvo estas lingvo vivanta, tiel forte enradikiĝis en la konvinko de ni ĉiuj, ke Esperanto estas lingvo, kiun neniu havas la rajton tuŝi arbitre.*

Adiaŭ; feliĉan vojaĝon! Ĝis la revido en la venonta Kongreso en Ameriko!

La Kvina Kongreso de Esperanto estas fermita.

Ĉiuj kongresanoj ĥore ekkantas *La Esperon*, kaj iom post iom, kun bedaŭro, eliras el la vasta halo, kie sonis la lastaj vortoj de l' Kongreso.

Vespere, en la Palaco de la Belartoj, la Urbeŝtaro adiaŭis oficiale la kongresanojn per honora vino, por kiu ĝi voĉdonis 5000 pesetojn.

\*  
\* \* \*

Kiel ni komence diris, tiu ĉi Kongreso certe estis la malplej « kongresa » el niaj Kongresoj, pro ĝia ne sufiĉe bona organizacio. Sed sendube en tio ĉi estas kulpaj ne niaj katalunaj samideanoj, kiuj plej fervore laboradis por ĝia preparado, sed la bedaŭrindaj eksteraj cirkonstancoj, la malfeliĉaj politikaj okazoj, kiuj en la lasta momento pli malpli paralizis ilian bonvolon. Tial oni tute ne konsideru kiel *riproĉojn* la kelkajn kritikojn en tiu ĉi raporto. « La veraj amikoj ne estas flatemuloj, la veraj amikoj senkaŝe diras sian penson » oni diris plej prave. Tiel ni senkaŝe montris tion, kio ŝajnis al ni ne bona en tiu ĉi Kongreso, por ke estontaj Kongresoj senĉese profitadu la sperton de la antaŭaj. Sed

ankaŭ estis bonaj partoj, precipe la propagando en Barcelono. En la ĝeneralaj kunsidoj pli kaj pli montriĝis vera elokventeco de esperantistaj oratoroj. Plej fruktodonaj estis la kunvenoj de la Lingva Komitato. Oni bonege laboris en la fakaj kunsidoj de Apotekistoj, Kuracistoj, Juristoj, Fervojistoj, Maristoj, Katolikoj, Vegetarianoj, Liberpensuloj, Publikoficistoj, Stenografistoj, k. t. p. Nova sukceso por Esperanto estis do malgraŭ ĉio la Barcelona Kongreso.

Mortis la Kvina, vivu nun la Sesa! Kaj de nun ni ĉiuj klopodu, ke *kiel eble plej multaj Eŭropanoj veturu al ĝi*, por ke ĝi ne estu proksimume nur amerika kongreso. Tio ankaŭ estus bedaŭrinda riproĉo!

D-ro P. CORRET.

P. S. — En la lasta momento ni ĝoje sciigas, ke D-ro Zamenhof ricevis de Lia Moŝto la Reĝo de Hispanujo la ordenon de Komandoro de Izabelo la Katolika.

